

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfi Dalmau, Isidre Torrents

La «GRAMÁTICA ESPAÑOLA» de la «REAL ACADEMIA ESPAÑOLA», lasta eldono (1924), paĝo 7, diras: «... los pueblos que hablan el catalán o alguna de sus variedades (Cataluña, Valencia y las Islas Baleares), conservan su propio lenguaje y lo cultivan literariamente...»

Esperante:

«... la popoloj kiuj parolas la katalunan lingvon aŭ iun el ĝiaj variaĵoj (Katalunujo, Valencio kaj la Balearaj Insuloj), konservas sian propran lingvaĵon kaj ĝin kulturigas literature...»

Neniun vorton ni demetis aŭ almetis al la teksto de la oficiala hispanlingva gramatiko, kiun ni ĉi-tie publikigas por klarigo, sciigo kaj evito de konfuzo pri la katalunlingva teritorio. Ni simple aldonu ke en Rusiljono (Orientaj Pireneoj en la Franca Ŝtato), en la Andorra Respubliko, en Alguer kaj aliaj urboj kaj vilaĝoj ekster la Hispana Ŝtato oni ankaŭ parolas katalune.

Kiel la franca kaj la hispana lingvoj estas ofte nomataj lingvoj de Molière kaj de Cervantes, tiel la kataluna estas nomata lingvo de Ausiàs March, kiu estis granda valencia poeto.

DELFI DALMAU

Pago por Lernantoj



Regiono. Parto de lando, korpo, surfaco, karakterizata de io speciala : polusa regiono, regiono de la koro.

Nacio. Aro de homoj, loĝantaj la saman teritorion kaj havantaj komunan devenon kaj lingvon. **Nacia.** De nacio, kiu koncernas nacion: nacia karaktero, nacia ligvo. **Nacieco.** Eco, ecoj karakterizantaj nacion.

Lingvo. Tutajo de la vortoj kaj esprimoj, uzataj de unu nacio por kompreniĝo: la angla ligvo.

Dialekto. Variaĵo de lingvo: Esperanto ne havas dialektojn, ĉar de la komenco de sia ekzistado ĝi havas literaturon, kiu fiksas la lingvon.

(El la oficiala Vortaro de Esperanto)

La granda esperanta verko «**Kataluna Antologio**» estas aperonta je la fino de la nuna oktobro.

Pri ĉiu artikolo subskribita, la aŭtoro estas responda.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gitaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

La XVII^a Universala Kongreso Genevo, Aŭgusto 1925^a

ĜENERALA IMPRESO

Plej bela urbo de paco kaj libero, en la plej bela kaj larĝanima nacio, en la plej internacia kontinento sur la Tero. Jen pri la scenejo de la XVII^a. La palacoj en Genève pretigitaj por kunvenoj kaj kunsidoj de kongresanoj, plifirmigis nian bonan impreson. Akurateco kaj lerto de la organizintoj por ĉio estis bela vero de la XVII^a. La Centra Komitato, kaj ĝenevaj pioniroj de nia Movado, akceptu nian sinceran gratulon. Certe plej ĉefa merito je la sukceso de la Kongreso, de Esperanto ĉe la ĝenevaj aŭtoritatoj kaj ĉe la internacia diplomata mondo, dankestas al nia lertega Edmond Privat. Rekonu pri tio estis unuanima, kaj justa.

PARENTEZO

Mi ne faras raporton, ĉi-tie, pri la Universala Esperantista Kongreso en 1925. Mi ne povas, mi ne devas. Ĉiu detalo estas tro grava. La veraj esperantistoj devas legi la oficialan kaj detalan raporton, pli bone, raportaron, en «Esperanto» de U. E. A. La veraj esperantistoj devas legi la nacian gazeton kaj ankaŭ la internaciajn, almenaŭ la ĝeneralajn. Viziti la Grupojn, informi kaj informiĝi pri nia Movado nacia kaj internacia. Do ĉi-tie mi diros nur personan komenton pri la XVII^a, pri ĝiaj ĉefaj programoj, kaj pri la faktoj pli rekte rilataj al K. E. F., kies reprezentanto mi estis en la Kongreso-

LA SOMERA UNIVERSITATO

Ĝi estis por mi plej alloga kongresajo: por la grava utiligo de Esperanto, por la vera vojo al lumo, por plej deca envojigo de la esperantistaro, ĉefe la Somera Universitato kaptis min por la Kongreso.

Mi nur timetis ke la profesoroj ne sufiĉe bone scipovos Esperanton. — Mi feliĉe trompiĝis. — Eĉ tiuj konataj nur pro ilia fama faka sciencisteco, bonege prelegis en Esperanto.

Mi ĉeestis la kursojn de Petro Stojan pri *Evoluo de la Esperanta Vortaro*; de Dro. Pierre Bovet pri *la Instinktoj de l' Infanoj*; de Dro. Charles Baudouin pri *Psikologio; kulturo de la spirita forto*; kaj de D-ro. Flügel pri *Psikanalizo kiel metodo kaj teorio*. Kaj mi bedaŭris ke mi ne povis ĉeesti la ceterajn pro samhoreco de ilia okazo kun la nomitaj. Tiuj kiuj ne treege interesis min ankaŭ por la temo, min interesis por la Lingvo.

Mi tre esperas ke la edimburgaj organizantoj de la XVIII^a evitos samhorecon, por ebligo ĉiujn kursojn ĉeesti. Mi ne volas dubi ke en ĉiuj okazontaj Universalaj Kongresoj Esperantistaj estos la Somera Universitato: niaj Oficialaj Institucioj devas plej interese certigi la okazigon de Universitataj kursoj de eminentaj profesoroj. La granda sukceso de la okazigitaj en Ĝenevo estas bela ordono.

La parolado de Dro. Privat en la Palaco de la Ligo de Nacioj pri la Strukturo de tiu Ligo atingis sukcesegon. Ĝi interesis la tutan kongresanaron. La granda Vitra Salono de la Palaco estis ne sufiĉa. Multaj kongresanoj devis restadi ekstere, kaj kelkaj devis eĉ rezigni la aŭdon. Efektive la parolado de nia pioniro meritas ĉi-tiun apartan citon.

NIA SALUTO AL LA KONGRESO

La fakto ke la du jarojn pasintajn sinsekve niaj reprezentantoj kamaraĵoj Gili kaj Solà ne povis plenumi la rajton kaj devon saluti la Kongresojn en Prago kaj en Vieno pro malpermeso de la eldoninto de «Homaranismo», Sro. Julio Mangada Rosenörn, tiel interesigas la aferon, ke ni devas aparte pridiri ĝin.

Post la stranga sperto de la du antaŭaj Kongresoj la organizaj pioniroj devis informiĝi kaj prepari sin por evito de tiu kurioza malpermeso. Tiel okazis, kaj en la Solena Malfermo de la XVII^a mi uzis la unu parolminuton al ĉiu delegito permesitan, por diri la jenan saluton. «Senpacience la katalunlingvaj samideanoj esperas kaj atendas ke mi trioble fervore en ĉi-tiu Kongreso saluton vin, en la nomo de tiuj samideanoj kiuj organizis la Kvinan Universalan Kongreson en Barcelono, de tiuj kiuj nun pere de la Kataluna Esperantista Federacio kaj »Kataluna Esperantisto« organizas la Internaciajn Florajn Ludojn por stimulo al esperanta literaturo, kaj esperas ke la nuna Kongreso estos granda sukceso baldaŭiga de la fina venko de Esperanto».

Kiel mi atingis saluti la Kongreson?

Ne sen granda defendo de mia rajto, farita ne de mi, sed de aliaj naciaj delegitoj en la Kunsido de K. R. por fiksi la tagordon kaj parolvicon de la Vespera Malfermo kun Centra Komitato. Mi intence malfruis en tiu Kunsido. Mi ne devis defendi rajton en urbo, en lando, en Kongreso, kie eĉ la atmosfero defendas rajton, kiam rajto estas atakata. Do mi simple eniris post la diskutoj, kaj mi demandis al la Prezidanto, ĉu mi rajtas saluti la Kongreson. Jes, respondis li afable; sed ĉu vi konsentas saluti *por la kataluna lingvo*, por eviti pluajn diskutojn? — Mi akceptas, mi respondis.

Kial Mangada volis ke mi salutos por la lingvo de Aŭsiàs March?

Ĉar tiel li povis atingi ke mia kara valencia samideano Piñó, ankaŭ salutos por la lingvo de Aŭsiàs March — La Valencia regiono estas ankaŭ je du trionoj teritorio de la lingvo de Aŭsiàs March. — Bedaŭrinde ne ĉestis Balearano, kaj Mangada ne povis salutigi lin ankaŭ por alia teritorio de la lingvo de Aŭsiàs March. Ne ĉar Mangada intencis dispecigi la katalunlingvan teritorion, sed, kontraŭe, ĉar li intencis kompensi al la katalunlingvaj esperantistoj dujaran malpermeson al salutrajto.

Nun bonvolu K. R. kaj C. K. ke mi faros du demandojn, kaj aludos problemon kiu postulas solvon:

Ĉu formala delegilo estas necesa kaj sufiĉa?

Ĉu simpla Mangada de nun povas nomigi salu tontojn? (Ĝis la XVII^a ni nur konstatis ke dujare Mangada povis malpermesi saluton de Delegito de nia Federacio malgraŭ formala delegilo, malgraŭ formala kaj aprobata aliĝo, malgraŭ paginteco al Konstanta Repraesentantaro, malgraŭ ke nia Federacio estas por aparta lingva teritorio, kun apartaj Lingva-Komitatanoj de antaŭ multaj jaroj, resume, malgraŭ ĉiuj formalajoj, plenumoj kaj fideltoj, de K. E. F.).

Kompreneble ni ne devas plendi ke por nia aparta lingvo, por la lingvo de Aŭsiàs March, en la XVII^a estis du salutantoj; ni, kontraŭe, danke emociĝis pro troa komplimento. Ni ankaŭ ne plendas sed ŝatas ke estis salutanto por la baska lingvo, tute aparta kaj memstara kiel sanskrita aŭ ĥina; ni, kontraŭe, ĝojas ke tiu tre interesa lingvo aperas, ĉar tial venis Esperanto en la mondon, por malnecesigi la mortigon aŭ sklavigon de naturaj lingvoj, ĉar laŭ vortoj de la Fundamenta Krestomatio:

«Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco elternadi diversajn fremdajn lingvojn oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝigante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon».

Aliflanke, laŭ diris al ni S-rino Morris en la Solena Malfermo, la fakto ke la granda Usono ne estas multlingva malfaciligas la propagandon de Esperanto. Tial ni deziras, kiel Zamenhof, ke la internacia lingvo konduku al granda fortiĝado kaj plena ekflorado de ĉiuj naciaj lingvoj.

Sed grava problemo aperas se oni ne difinas formalajojn por rajtigo

de Delegitoj, ĉar se ĝis nun estis nur unu Mangada, kiu volis malpermesi salutrajton nur al unu Delegito ĉiujare, aŭ nomigi nur du salutontojn, morgaŭ la malpermeso aŭ la nomigo povos rilati pli grandan nombron, aŭ ne nur unu Mangada, sed pluraj povos aperi, se oni konstatas la eblon kaj sukceson de Mangada privilegio. Kaj eĉ tento fariĝos al ĉiuj Delegitoj mangadiĝi.

SOLENAĴOJ KAJ GRAVAĴOJ

La Malferma Kunsido de la Somera Universitato, en kiu okazis, krom la malfermaj paroladoj de pioniroj kaj profesoroj, profunda prelego de Won Kenn pri la penso de Konfucio, kiun mi ĉeestis kiel Universitatan instruon.

La Solena Malfermo de la Kongreso en kiu impresis nin grava deklaro de la Ĝeneva ŝtatrepresentanto S-ro. Oltramare, profesoro de latina lingvo, per oficiala deklaro kunvoki internacian oficialan konferencon pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn de ĉiuj landoj, tuj kiam la esperantistaro juĝos la aferon decatempe; kortuŝis nin elokventa parolado de Edmond Privat pri la vivo de Zamenhof kaj la historio de Esperanto kaj ĝia interna ideo; ĉarmis nin milda voĉo de bele aristokrata malavara por Esperanto, usona sinjorino Dave H. Morris.

La Ferma Kunsido, honore al nia Majstro, kun pioniraj paroladoj pri liaj ecoj kaj genio. S-ino. Isbrücker rimarkiĝis en ĝi kiel bona oratorino tre saĝa, tre agrabla, inteligenta kaj serioza.

ORGANIZO KAJ LABORO

Universala Esperanto-Asocio, Konstanta Reprezentantaro, Centra Komitato, Lingva Komitato kaj Akademio, niaj Oficialaj Institucioj por nia Movado kaj por nia Lingvo, pli kaj pli peciziĝas kaj fortikiĝas. Iliaj elementoj el ĉiuj landoj devas helpi, diri opiniojn, inspiri plibonigojn, decatempe, akurate, bonintence, helpeme, ofereme. Ĉefa afero estas bonfido kaj konfido. Envio kaj ĵaluzo povas esti tre danĝeraj. Dio scias ke mi estas nek kredema nek konservativa. Sed ni devas esti plej saĝaj kaj konsciaj kaj singardemaj por sanktaj aferoj kiel Esperanto kaj Esperantismo. La funkciado de niaj internaciaj, universalaj Institucioj, estas nun tiel necesa kiel malfacila. Ni estu, do, prudentaj kaj ne ĵetu ŝtonojn, sed, proponu konstruajn brikojn por ne certa sed eventuala helpo, ebla utilo. Ni ĉefe respondu akurate, pripense kaj labore la petojn kaj demandojn de niaj Oficialaj Institucioj. Iliaj gvidantoj kaj iliaj profesiaj helpantoj estas konataj de ni kiel bonaj kaj lertaj samideanoj. Ni estu bonfidaj kaj severaj tiel por ili kiel por ni.

VIZITOJ KAJ FESTOJ

Tre ĉarmaj estis la teatraĵo kaj la ŝipekskurso sur la Lemana Lago. Tre instrua la vizito al la Laboroficejo de la Ligo de Nacioj. Vere ravaj ĉiuj vidaĵoj, ĉiuj konaĵoj de la mirinda Ĝenevo. Belaj, puraj, stratoj, placoj, parkoj, promenejoj, revejoj.

La interparolado popola en Universala Kongreso estas efika por nia lingvo kaj movado. Oni mallernas erarojn kaj lernas korektaĵojn. Oni informiĝas pri la problemoj komunaj kaj privataj de pluraj popoloj. La vero pri la homa identeco super internaj popolaj apartaĵoj fariĝas pli evidenta. Kaj la interpersonaj diferencoj pro individuaj kulturo, karaktero kaj temperamento ankaŭ montriĝas super internaj popolaj apartaĵoj. La realo de apartaĵoj, ĉiuj same pravaj, pro historio, geografio, evoluo kaj revolucioj, inspiras pli profundan respekton por ĉiuj variaĵoj kaj pli sinceran fervoron por komunaj neŭtralaj helpaj solvoj kiel esperanto, kulturo, scienco, arto.

KELKAJ PERSONAJ TRAJTOJ

La personaj interkoniĝoj estas sennombraj por ĉiu kongresano. Sed mi nur ion diros pri kelkaj, kiuj havas esperantistaran intereson:

Ed. Privat, la hodiaŭa efektiva pioniro de nia Movado. Mi sentis min apud li libere, facile. Ĉiu sentas sin apud li tiel, ĉar li estas komprenema, bonkarakterata; liaj eminentecoj ne fierigas lin; kaj li estas grandamina kiel bona sviso.

Cart, la Prezidanto de nia Akademio, la severa gvidanto de nia lingva oficialeco, la fidela posteulo de Boirac. Estas bele kaj ĝoje ke eminentaj francoj, kies natura lingvo atingis grandan internaciecon, montras tian justemon kaj homaramon, ke ili plej firme tenas la kondukilon de lingva neŭtraleco por ĉiuj popoloj grandaj kaj malgrandaj sur la Tero.

Hans Jakob, la granda laboranto profesia Direktoro de U. E. A.; financa ministro kiu venkis plej grandajn persistajn esperantistajn monaĵojn barojn per konstanta frapado, per admonoj aŭ komplimentoj. Feliĉa sviso kiu povas esti oficiale nomata *Hans* en svisa urbo kies natura lingvo estas franca. — Svisa feliĉo!

Robert Kreuz, kiu ŝajnas peza, estas flua, fluga laboranto, eĉ por la plej flua, fluga laboro: stenografiado. Tre sperta samideano kies fervoro submetis lin al nia movado eĉ profesie. Tre kapabla poligloto: inter la multaj lingvoj de li konataj estas la lingvo de Aŭsiàs March, kiu havis du salutantojn en la Solena Malfermo de la XVII^a. — Ĉu nia amiko ĝin lernis pro antaŭvido al tiu eksterordinaraĵo?

Abato Ĉe, la simpatiuilo: unu el la plej belaj juna, inteligenta, ĉarma, senedza kongresanino enamiĝis je li je tri el la ses psikanalizaj enamiĝoj. Li estas ĉiam venka diplomato de Esperantujo: niaj diplomatoj devas venki per simpatio kaj pacigo. Lia oratoreco estas malrapida kaj senhezita: firma, ĝusta: tial plej bone elokventa. — Nesuperebla profesiulo por nia Movado. Ĝeneraliĝis la diro inter la kongresanoj, ke inter Abato Ĉe kaj Dio estas neniu diferenco, ĉar la dua estas ĉie, kaj la unua ĉie Ĉe estas.

Petro Stojan, kvazaŭ naskiĝinta cele al Esperanto: virtulo kaj fervorulo en ĉiuj vojoj al paco kaj frateco. Lingvisto pro naturo. Esperantisto pro konscio. Homarano ĉar li ne povas eviti sentadi ĉiajn homarajn idealojn ĉieligajn. Li estas la bela infano naskita el edziĝo de Okcidento kaj Orien-

to. La feliĉaj kursanoj liaj en la Somera Universitato, neniam forgesos lin, kaj ĉiam konstatos ke parolante pruvigas liaj profundaj malkaŝoj.

Mi ja volus prezenti multajn eminentulojn el Esperantujo kiujn mi ne povas forgesi: ĉiujn profesorojn de la Somera Universitato, ĉiujn membrojn de la Centra Komitato, k. a. Mi ankaŭ volus ilin priskribi precize, ĝuste, juste, sed loko mankas, tempo mankas, mil devoj tiras min al profesiaj kaj aliaj okupoj.

Mi devis almenaŭ nomi niajn du ĉefajn respondajn gvidantojn, kaj niajn kvar ĉefajn respondajn profesiulojn de niaj Oficialaj Institutioj.

Mi tamen ne povas eviti du pluajn aludojn:

Al eminenta Ĝeneva ŝtatrepresentanto, latinista profesoro Oltramare, ĉarma aŭtoritatulo kiu favorege paroladis pri nia afero, en la nomo de la Ĝeneva Ŝtato, de la Ĝeneva Respubliko en la malgranda plurŝtata, plurnacia, plurlingva Svisa Konfederacio. Bela Svisujo, nacia internacio, nacio internacia. Belega Ĝenevo, ĉefurbo kaj suno de la registarara politiko.

Kaj al Sinjorino Isbrücker. — Kiu diris ke ĉe la esperantistinaro estas nur malbelaj fraŭlinoj? — Sinjorino Isbrücker montras sintezon de ĉiaj sinjorinaj ĉarmoj. Ŝia kunesto en la Centra Komitato mildigos la diskutojn, dolĉigos la atmosferon. Komitato el nur viroj fariĝas foje akra, malmola. Virina ĉesto, sinjorina kunesto evitas akriĝojn kaj malmoliĝojn. — Mia plumo ne povas halti: la nomoj de fraŭlinoj Zamenhof, sinjorino Tiard, sinjorino Dave H. Morris, Marie Haukel, Louise Briggs, Blaise, Osmond, Schepank, Gérard, Farges, Ferter, Thooris, kaj tiom da pionirinoj postulas memorigon, dankemon.

KVAR RIMARRIGAJ RIMARKETOJ

La unuaj premiojn en la Oratora Konkurso de la XVIII^a atingos Ĉe, Inglada, Isbrücker, Kenn, Olšvanger kaj Privat, se oni ilin ne konsideros superkonkursaj.

—

Charles Richet devas tuj esti petata prelegi en la Somera Universitato en Edinburg.

—

La skotoj ne estas angloj, la angloj ne estas skotoj: tial ili bone interkonsentas en Esperantujo, kaj la XVIII^a sukcesegos!

—

La fonetiko de Esperanto devas esti pli severe zorgata. El ĉiuj nacilingvoj estas bonaj elparolantoj. Ĉiuj, do, povas atingi decan prononcon. Eĉ plej eminentajn samideanojn ni rimarkis diftongiĝi ekz. *ie, ia*. — Kial?

DELFI DALMAU

El Alparolo de Prof. Cart

de la Malfermo de la Somera Uuiversitato, Genève 1925

«Permesu, gesinoroj, ke mi proponu al vi hodiaŭ nur unu aŭ du ideojn, kiujn vi disvolvos mem, se ili ŝajnas al vi interesaj.

Esperanto estas *vivanta* lingvo, *vivanta*, ĉar ĝi estas la lingvo de malgranda popolo, kiu ĝin amas kaj ĝin konstante uzas, sed *vivanta*, verdire, ĝi estis jam de la komenco, tial ke ĝi tradukis ne simple vortojn el alia lingvo, kiel multaj antaŭaj aŭ nunaj projektoj faras, sed tial ke ĝi tradukis penson, kiu plenokupis la spiriton de ĝia elpensinto, D-ro Zamenhof. Ĝi ne estas nur kunmetado, pli malpli feliĉa, de gramatikaj reguloj kaj vortoj, ĝi estas la esprimo de ideo. La lingvo, hodiaŭ *nia* lingvo, estas filo de ideo, kaj la ideo donis al la naskiĝanta lingvo *animon*, donis al ĝi la vivan blovon, la vivan spiradon! — Se oni riproĉas nin pri nia tiel nomata mistiko, ni ne malkvietiĝu: la koncepto mem de vivo estas mistika. — Se Esperanto vivas, ĝi evoluos kaj devas evolui, kiel evoluas ĉiuj vivantaj lingvoj. Tiun ĉi evoluadon konstatas la gramatikistoj kaj vortaristoj, pli ol ili ĝin helpas. Ĝi estas la rezulto de l' popola uzado sendube; sed precipe, kaj precipe depost la naskiĝo de la presarto, — ĝi estas la rezulto de la laboro de la aŭtoroj, de la pensuloj, kiuj, dank' al siaj verkoj, pliriĉigas la lingvon, ĝin «elastigas», precizigas la sencon de la vortoj aŭ ĝin plilarĝigas. — Neniu lingvo, eĉ niaj plej malnovaj kaj plej vortoriĉaj elĉerpas, tutĉerpas la penson. La konstanta penado de la pensuloj — se al tiu vorto oni donas plej vastan signifon — estas «envortigi» plej precize ilian penson, kaj tiu penado estas unu el la ĉefaj faktoroj de la lingva evoluado. La penso, la ideo vivigas la lingvon, ĝin kreas por la plenumado de niaj plej diversaj bezonoj ĉu materialaj, ĉu spiritaj. — Certe, Esperanto, lingvo tre juna, kvankam ĝi profitis kaj profitas la spertojn de siaj antaŭuloj kaj utiligas ilian vorttrezoron, havas ankoraŭ multon por akiri, sed ĝi pruvis per jam tre riĉa libraro, ke sur ĉiuj kampoj: beletristikaj, sciencaj, filozofiaj, kiel en la ĉiutaga vivo, ĝi estas kapabla traduki la homan pensadon. La *tutan* homan pensadon? Ne, certel tial ke ĉiuj niaj lingvoj penadas ankoraŭ por ĝin esprimi, sed iom post iom ĝi sukcesos, se la aŭtoroj, la scienculoj, la pensuloj — kaj ankaŭ la industriistoj, la komercistoj konsentas ĝin serioze lerni *ĝis plena posedo*, kaj penadas por esprimi per ĝi tion, kion ĝis nun ili povis esprimi nur en sia gepatra lingvo. — Al tiu ĉi kunlaborado ni invitas ilin hodiaŭ por venki ilian skeptikecon, ni organizis tiujn paroladojn kaj prelegojn ankoraŭ tre moderajn kaj modestajn, sed kiuj, post pli malpli longa tempo, dank' al ilia kunhelpo povos fariĝi tre gravaj por la internacia civilizado, por la tuta homaro!

V e n ĝ o

Jenmaniere ĝi okazis.

Iutage promenante tra la urbo Rolf Torsen vidis fraŭlinon, kiu forte, preskaŭ magie altiris liajn rigardojn. Ŝian vizaĝon li ne povis ekvidi. Jam ŝi estis preterpasinta, kiam li levis siajn okulojn al ŝi, instigate de ia nekla-riĝebla forto. Ŝi estis vestita per nigre-blua kostumo kaj brunleda ĉapelo, simple, sed elegante. En unu mano ŝi portis libron.

La vestmaniero, la libro, kiun li ekkonis lernolibro de la landa lingvo, eĉ ŝia iro konvinkis lin, ke ŝi ne estas italino. Kaj kun la varma deziro renkonti ŝin, por eble ekscii, ĉu ŝi estas el la sama terparto kiel li, kion li preskaŭ konjektis, li volis ŝin sekvi. Sed jam tro malfrue. Ŝi estis malaperinta ĉe la proksima stratangulo kaj supozeble tuj enirinta domon. Kaj ĉar Rolf Torsen havis urĝan komision por fari, li nur konservis la esperon ŝin renkonte revidi aliatage.

Efektive, baldaŭ poste li ree ŝin ekvidis en la publikaj ĝardenoj. Ŝi sidis tie kun tri geinfanoj. «Do, instruistino aŭ guvernantino ŝi estas», pensis Rolf. Sed ree li ne povis paroli kun ŝi, ĉar venis amiko kiu lin forakompanis kaj al kiu li ne volis montri sian intereson por la beleta fremdulino. Ĉar beleta ŝi estis, tion li povis konstati jam de malproksime.

Fine, post paso de kelko da tagoj, li estis pli bonŝanca. Elirante el koncerto li vidis ŝin iom antaŭ si, kaj post kiam li estis apud ŝi, alparolante li demandis al ŝi en germana lingvo: «Senkulpigu mian senĝenecon, fraŭlino, kiu igis min supozi ke vi estas samlandanino. Ĉu mi pravas? Mi estas germano el Ŝlesvigo, mia nomo Rolf Torsen».

Mirigite ŝi levis al li la vizaĝon, kiu esprimis nekaŝitan surprizon.

«Vere», ŝi ridetis al li, «vi povas rimarki sur mia vizaĝo mian miron kaj surprizon, renkonti ĉi tie en suda Italio germanon, duonsamlandanon. Ĉar mi estas el Ĉeĥoslovakio, sed patrinflanke el Germanlando. Mi nomiĝas Hela Kantek kaj vere multege mi ĝojas ekkoni vin. Nur de malmulta tempo mi troviĝas tie ĉi kiel guvernantino».

Kaj ŝi daŭrigis sian babiladon rakontante al li siajn ĝisnunajn travivaĵojn en fremdlando. Ŝia parolo montris al li, ke ŝi ne sentas sin feliĉa, ke la tute ŝanĝita vivmaniero al ŝi malplaĉas, ke por la neobeemaj, trodorlotitaj infanoj ŝi estas tro malforta.

Li silentema, ĝuis la «dolĉan vokon, agrablegan sonon de l'hejma lingvo en la fremda laudo». Ŝia voĉo kun iom jam da slava akcento kaj stranga metala malmoleco entulis lin. Estis hejmaj sonoj, hejmaj vortoj! Kvan-kam ne estis lia amata gepatra norda dialekto! Antaŭ lia spirita vido etendiĝis la larĝaj, grasteraj kampoj de lia hejmmregiono, kaj homoj iom malviglij kun malgraciaj movoj, sed kun kredo kaj fidelo en la koro laboradas kaj kulturadas ilin. Kaj malproksima la griza maro eterne ondbruanta. Sur ĝia bordo loĝas liaj karuloj; hejme, hejme!

Kaj tial li ekametis ŝin, ne pro ŝia persono cetere ankaŭ vere aminda.

sed pro ilia komuna lingvo. De nun, ili kunvenis ofte, laŭeble. La moroj de la lando ja ne permesis al ili senĝenan kunestadon; sed vespere, kiam ŝi iris por hejmen akompani la infanojn el la lernejo, li povis ŝin atendi kaj poste iri kun ŝi dum kvarona aŭ duona horeto ĝis la domo de ŝiaj gemastroj.

Baldaŭ li fariĝis ŝia fidinda amiko. Ŝi konfidencis al li siajn ĉagreniĝojn siajn esperojn kaj dezirojn. Danke li akceptis tiun rolon de klariganta, konsilanta, iafaje eĉ konsalanta amiko, helpis kiam ajn li povis, kaj kiel plejbelan dankon aŭdis el ŝia buŝo la karan patrolandan lingvon.

Ilij interrilatoj havis karakteron pure amikan. Neniam li tuŝis amafereojn, neniam ŝi aludis tiun temon. Tamen al li ŝajnis ke iafaje io en ŝi brulas. Iun tagon ŝi rakontis al li, ke iu amikino ŝia pli juna fianĉiniĝis tre surprize. Kaj aldonante ŝi diris, ke ŝi havas jam dudek ok jarojn. Li ne volis tion kredi; ĝi ŝajnis al li troigita. Ŝi ne insistis lin kredigi pri ĝi, sed ankaŭ ne daŭrigis la temon, kaj komencis paroli pri aliaj aferoj.

La postan tagon sidante sur la kutima benko en tre malgranda parko-placeto de la urbo, kie li ĉiam ŝin atendis, li pripensis la hieraŭan konversacion, kaj ia malkvieto lin atakis. Ili rilatis unu al alia ja ĉiam nur amike, tre kore, sindoneme, — jes, sed almenaŭ liallanke ne intermiksiĝis profunda ama sento». Ne, tio estas nura imagaĵo mia», pensis li, kaj tuj tute rekvietiĝis. La loko helpis lin al tio. En la placeta mezo plaŭdetadis senlaca fontano; kaj la akveroj dispruciĝantaj briletis kaj fulmetis en la lumradioj de la subiranta suno. Rondo da palmoj kun folioj ventumilaj dolĉe susuris kaj bruetis en facila aero. Ĉirkaŭ ili grupiĝis orangujoj kun la belkoloraj fruktogloboj en la sature verda foliaro. Ravite la okuloj de Rolf fiksis sin al la belega aspekto.

Ekalvenis lernantoj hejmen irantaj el la lernejoj. Sub la arboj ili komencis ludi piedpilkon kaj detruis per siaj krioj kaj laŭtaj alvokoj la regantan pacan idilion. Rolf rigardinte la poŝhorloĝon jam intencis foriri supozante ke lia atendado hodiaŭ estis vana, sed denove, kiel jam ofte, kvazaŭ malproksima magneto turnigis lian kapon — liaj rigardoj renkontis la ŝiajn.

«Mi estas hodiaŭ iom malfruiĝinta, ĉu ne?» ŝi demandis lin ridetante. «Nu, espereble tio ne gravas al vi», kaj en ŝia kutima detalema maniero ŝi rakontis al li la kaŭzon de la malfruiĝo kaj ceterajn okazaĵojn de l' tago.

Kaj ŝajne restis inter ili konstanta amikeco.

Venis Kristnasko. «Ho festo germana kun via kandelradianta, belornamita arbo, viaj donacoj kaj donacetoj brilegigantaj purajn infanokulojn, viaj korintimaj melodioj kaj kantoj, kio fariĝas el vi en fremdlando», pensis Rolf Torsen, kiam li la sanktan nokton sola kaj soleca sidis en sia ĉambreto. Profunda sopiro pri neĝo, kristnaska noktsonorado kaj infanaj ĝoj-kantoj lin turmentis. Ekstere frapadis senĉese pluvo al la vitroj. Li ne povis nek volis tion suferi pli longe, kaj tial li enlitiĝis. Nur la espero, ke la morgaŭan tagon li kunvenos kun ŝi kaj alia novalveninta samnaciono, por festeti kune Kristnaskon, lin konsolis iom. Jen, malantaŭ la ŝranko troviĝas la ĉampanbotelo, kiun li aĉetis por pligravigi la soleneton.

La morgaŭo venis. Duope Rolf kaj la alia germano iris por ŝin akompani al sia loĝejo. Hezite ŝi venis. Sed baldaŭ en la gaja societo malaperis ĉia timo ŝia pro la nekonveneco de ŝia ago en tiu lando. «Ba», ŝi diris, «mi ja ne estas enlandulino. Tiuj laŭplaĉe vivu monaĥine!». La ĉampano kreis sinceran gajan humoron inter la triopo kaj eble kaŭzis, ke ŝi nomis Rolf' on iafoje per «ci». Li miregis, sed ŝajnigis estis neaŭdinta ĝin.

Ĉiuj tri bedaŭris multe, ke tiom rapide pasis la du horoj disponeblaj. Certe al ĉiu el ili alportis iom da hejma kristnaska sentimento la kunesto, la komuna gepatra lingvo, la rememoroj pri pasigitaj Kristnaskoj en antaŭaj jaroj.

Venis februaro. La suda temperaturo estigis ampleksan floradon ĉie. Rapida printempo disetendis ĉiujnsiajn ĉarmojn tra la lando. Ekregis ĝojo en la tuta naturo. Sed por Rolf estis venonta abrupta ŝanĝo en liaj rilatoj al Hela.

Iun sabato vesperon li promenatis kun ŝi, kiel kutime. Ŝi estis afliktita. La vivado en fremdlando ne plu plaĉis al ŝi. La infanoj turmentis ŝin laŭdire terure per malobeemo kaj malico. Kaj ŝi estis postulinta maldungigon. Novan oficon ankoraŭ ŝi ne havis, sed esperis trovi dum ne longe. Li demandis, ĉu iel li povos helpi al ŝi. «Al mi neniu povas helpi» estis respondo.

La sekvantan dimanĉon li renkontis ŝin en la teatro. Tuj li ekrimarkis ian strangan ŝanĝon en ŝia mieno, sur ŝiaj trajtoj. Ŝi rapide, kvazaŭ pelite de interna puŝo lin adiaŭis, senkulpigante sin per malbona humoro, sed promesante al li klarigon dum la proksimvenonta promena kunesto. Ĉion ĉi li ne atentis tro multe kaj restis en kvieta atendo.

Kiom surprizita li estis, kiam li lundmatene ricevis de ŝi bileton: «S-ro Torsen! Certe vi divenis jam ĉion laŭ mia hieraŭa konduto. Bonvolu ne plu kruci miajn vojojn. Ne pensu malbone pri mi; sed estas pli bone ke ni evitu nin reciproke. H. K.».

Dum la tuta tago li estis pripensema. Kio estis okazinta? Kial ŝi agis tiel? Sed klarigon nur iomete verŝajnan li ne trovis.

Do, la sekvantan posttagmezon li serĉis ŝin en la ĝardenoj, kie ŝi kutimis promeni kun la infanoj dum unu horo. Efektive li renkontis ŝin. Sed aŭstataŭ kiel antaŭe afable saluti lin, ŝi riproĉe diris: «Ĉu vi ne ricevis mian leteron?».

«Jes, sed...» «Do, vi komprenas» — ŝi interrompis, «ke mi ne volas havi plu iajn rilatojn kun vi. Vi scias, ke mi baldaŭ foriros. Lasu min do!».

«Sed oni ne kondamnas akuziton senaŭskultite», diris li per kolera kaj ekscitita voĉo tremanta.

«Ne devigu min al ekstremo», respondis ŝi, aldonis mallongan «adiaŭ» kaj turnis al li la dorson.

Kion li povos fari? Ĉirkaŭe staris homoj ilin observantaj. Li foriris kun ŝiritaj sentoj, ĉar ŝi estis por li pli ol simpla amikino, ŝi estis por li en la fremdnacio simbolo de hejmo kaj patrujo.

Vespere li skribis al ŝi leteron, en kiun li verŝis la fluon de sia doloro pro ŝi, pro ŝia maljusteco.

«Kara fraŭlino Hela!

Mi ne plu rajtu kruci viajn vojojn — sed tiom kruela vi ne estos al mi malpermesi, ke mi skribas. Vidu, neeble estas por mi kompreni la pasintaĵon, kaj ju pli longe mi primeditas, des pli nekomprenebla ŝajnas al mi ĉio. La malĝojo pro viaj maldolĉaj vortoj enfosiĝas en mi ĉiam pli kaj pli forte. Jam ne estas mi en la aĝo elasta, kiu forgesas kaj venkas tuj ian malagrablaĵon. Depost dimanĉvespere fariĝis eklipso por mi ĉiam pli ombriganta. Diru, mi vin insiste petas, kion mi krimis? Ja mi ne filatas al mi esti homo senerara, senmanka. Sed ĝuste rilate vin mi malgraŭ ĉio ne povas min kulpiĝi iel.

Restas la sola klarigo, ke iu diris al vi terurajn mensogojn. Sed kiu, kiu? Vere, ĉio estas al mi enigmo.

Kara Hela, mi konfesas al vi, ke tia enigmo min doloras. Pensu pri nia antaŭa amikeco kora, pri niaj kunpromenoj. Vi estis al mi fonto kie mi povis ĉiam ĉerpi klaran fluantan akvon. Kaj nun mi estu kondamnita ne sciante la kialon? Riproĉu min, se mi meritis viaopinie. Bone. Kontraŭ riproĉoj oni povas sin defendi. Sed — pardonu! — tia senestima forĵeto de amiko kia mi estis al vi — kaj estas, tio ne estas la agmaniero de rektaj, sinceraj homoj.

Vian bileton ĉi-kune mi resendadas. Mi ne volas ankoraŭ kredi.

Sed se tamen ĉio estus vero? Ĉu mi povas alvoki al amikino, kiu opinias mian amikecon eĉ ne inda je kelkaj klarigaj vortetoj? Kiu min forpuŝas senkaŭze? Neniam ajn okazu al vi la samo! Via R. Torsen».

Li alportis tiun leteron persone al ŝia domo. Du horoj poste li tenis en la manoj jam la respondon. Preskaŭ certe pri trovota klarigo li malfermis la koverton. Elfalis lia propra letero, ŝia unua kaj nova bileto. Avide li superflugis ĝin perokule. Ŝi skribis:

«S-ro T., bonvolu ne ĝeni min kaj lasu min en paco. Mi havas nun aliajn interesojn kaj neniu tempon por lamentaj leteroj. — Pri via amikeco mi ne kredas plu, ĉar vi ŝajne vivis en «deliro memflategema». Jen mia lasta vorto kaj fino H. K.»

Kvazaŭ pugnobato en la vizaĝon lin trafis tiuj linioj. Ofendita, insultita de virino, por kiu li sentis neniam aliajn sentimentojn ol ŝataj, respektaj kaj amikaj! Bolis lia sango, sed fine pripensinte ĉion li pli kaj pli konvinkigis ke li fariĝis viktimo de abomena kalumnio. Sed kiu estis tia fiulo? La nova germano? Certne ne, Li ne havis interrilatojn kun ŝi. Kiu do?

Vane li meditis. Li ne povis elpensi ĝin.

Pasis preskaŭ du monatoj. Li evitis ŝin renkonti, eĉ ŝin vidi. Nur hazarde li ekciis, ke ŝi nun havas interrilatojn kun italo. Sed li malamamis informi sin pli detale. Forgesi ĉion, tion li aspiris. Kaj preskaŭ li sukcesis. Nur de tempo al tempo lin trapikis subita dolorsento.

Jen venis la neatenditaĵo, iutage en aprilo, kiam leviĝanta krepusko jam signis la orpason de la luma tago.

Li sidis en sia ĉambreto skriblaborante, kiam malforta ekfrapo je la pordo lin atentigis. »Eniru!» li diris sufiĉe laŭte. Neniu respondis. «Eniru!» li ripetis, samtempe irante al la pordo por ĝin malfermi. Sed ĝi mem malfermiĝis kaj enpaŝis — Hela.

Nepriskribebla estis lia surprizo. Sed samtempe li denove eksentis la malbonon, kiun ŝi al li faris. Kaj iom malvarme li ekparolis:

«Vi? Efektive mi ne povus imagi, ke vi, ĝuste vi al mi venos. Kia estas deziro?».

Hezite, treme ŝi alpaŝis lin.

«Mi scias, ke mi estas kulpa», diris ŝi. «Sed mi scias ankaŭ, ke mi ne povas plu vivi ne kenfesinte mian kulpon. Pardonu min, ho pardonu!

«Kiel? Mi ne deziras lamentajn parolojn. Bonvolu lasi min en paco!» — rediris li.

Ŝi bone rimarkis, ke li uzis similajn vortojn kiel ŝi en ŝia lasta skribaĵo kaj dolore ŝi ektremis.

«Ne punu min tiel» ŝi petis per flatema voĉo. «Mia malfeliĉo estas granda. Morgaŭ mi foriros. Laste mi venas al vi, alie mi ne povus foriri. Estu bona al mi, estu ree mia amiko, estu kaj eksingultante ŝi kaŝis la vizaĝon en la manoj, «komkompatu, komprenu min; sciu» — ekprenante lian manon ŝi metis sur ĝin la larmplenan vizaĝon — «sen vi — mi ne povas esti — mi — amas vin».

Tiu amkonfeso preskaŭ konsternis lin. Potencaj sentoj kontraŭbatalantaj sin vekigis en lia brusto. Li memoris pri bela tempo pasinta kaj pri ŝia malnobla ago — kaj fortiris sian manon.

«Vidu, fraŭlino Hela», post longa paŭzo li komencis per devige neŝanceliĝa voĉo, «mi ne koleras vin plu. Sed via faro engravuriĝis en mi. Ankaŭ volonte * mi ne povas ĝin, elŝiri el mia koro. Kial vi faris tion? Eble mi povus nun esti plej feliĉa homo aŭdinte vian amkonfeson. Antaŭ tiu dimanĉvespero en la teatro — kial mi ne diru al vi? — eknaskiĝis en mi delikataj pensoj, sekretaj deziroj, tamen sen ke mi tro atentis ilin. Mi ja ne estas plu en la unuaj junecaj jaroj — mia tuta karaktero ankaŭ ne emas al nepripensitaĵoj. Sed kiu scias? Se ne estus falinta tiu mortiga roso sur la ankoraŭ tro subtílajn printempfloretojn — kiu scias? Sed tiam ili frue velkis, pereis».

«Ĉu ili ne povos ree ekflori? Pli bele, pli forte ol antaŭe? Mi volas ĉion eldiri, ĉion konfesi. Mia abrupta tiama ŝanĝiĝo — estis parte volita de mi. Aŭskultu. Mia sinjoro iomete denunciis vin. Ne ekscitiĝu» — ĉar li faris subitan ekmovon — «estis nenio. Ŝi ne komprenas niajn pli liberajn germanajn kutimojn. Sed tio instigis min al mia jam ofte pripensita faro. Kaj krome estis tiu italo min flateginta — mi estis freneza, mi sekvis blindigan iluzion, kiu min igis esti terure maljusta kontraŭ vi, agi abomeninde. Sed ĉefe — kredu min! — estis la amo al vi la risorto de mia ago. Mi volis vin

*) volante = se mi volus,

devigi, pensi pri mi kaj fine sopiri je mi. Mi eraris tion farante — pekis. Ab-solvu min, karulo. La amo en mi flagris, brulis, ardis ĉiam pli potence. Vi rifuzis min. Kaj tial, ho pardonu! mi ĵetis min en momento, kiam mi ne estis mi mem, en la brakojn de tiu — malindulo. Jen vidu min antaŭ viaj piedoj».

Kaj ŝi ĉirkaŭprenis liajn genuojn faliginte sin teren.

Li emociĝis; sed ama resonado ne respondis en lia brusto. Tro malfrue! Kaj li decidis fini, por ne plilongigi sennecese ŝiajn kaj siajn dolorojn.

Delikate li eklevis ŝin kaj milde alparolis; «Hela, ĉio jam estas nealigebla. Rezignu. Mi konservas nenian kolersenton kontraŭ vi. Sed ami vin mi ne povas, ne povas. Forgesu min kaj ni disiru!».

Ŝi nun ŝajnis kvieta. Nur en ŝiaj okuloj fajreris.

«Do, Rolf, vi min forpuŝas? Vi min forpelas? Ho Dio! Sen vi — ne, neniam! Al mi ŝajnas ke mia amo kreskas des pli, ju pli vi rezistas. La laston mi ekprovu» kaj ŝi turnis sin al la pordo.

Rolf, por ne ŝanceliĝi lastmomente, murmuris «adiaŭ» kaj turnis sin fenestren, kie li komenci nerve tamburi sur la vitroj. Li aŭdis surdan brueton, kvazaŭ iu ĉifus vestojn, tolaĵon; sed persisteme, por ne daŭrigi la dolorigan scenon, li restis eu sia pozo kun la vizaĝo kontraŭ la malvarma vitro.

Post longa tempo li returnis sin. Li estis konvinkita, ke ŝi senbrue estis elirinta. Sed — jen kio estas? Lian liton ĉirkaŭis longa kurteno. Ĝi nun ekmovigis, kaj tuj poste estis forte flanken tirata. Kaj eliris — subita fulmo falanta antaŭ li el sennuba, plej serena somerĉielo ne povus lin pli rigidigi — estaĵo nuda, blanka kun la molruĝa nuanco de sanfloranta karno — Hela. La brakojn ŝi tenis krucitaj super sia belformita brusto, kaj kiel diinstatuo reliefigis la marmoro de ŝiaj admirindaj formoj sur la malhela fono de la litkurteno. Kun deloga rideto sur la lipoj ŝi faris unu paŝon al Rolf, kiu staris rigide, senmove, senforte, ensorĉite.

«Vi vidas min», ŝi diris per mildega tono, «kia mi estas; kia mi estis ankaŭ en viaj songoj, ĉu ne? kia mi de nun vivos ĉiam en via memoro. Mi ne konas honton antaŭ vi, unika amato. Por vi mi fordonas ĉion. Por vi mi faras ĉion. Kaj mi faris tion, ĉar nenion mi volis preterlasi, kio povus iel al mi helpi por vin gajni. Sciu, ke mia patro estis slavo, kaj parte slava sango fluas volupte tra miaj vejnoj. Venu, plejkarulo!».

Kaj malrapide, kvazaŭ solene sin etendis ŝiaj du alabastrekoloraj brakoj al li.

Rolf troviĝis en ekstazo de admirego kaj samtempe de malespero. Ŝi renversis lian internon, ŝi ekscitegis lin, kiel ajn nur virino scias eksciti viron, ŝi enigis lin en febredeliran staton. Li sentis, kiel lin forlasas volo kaj forto, li estis sorĉe, magie altirata, allogata de la beleganta promesanta nudeco ŝia, kaj nur la obtuza sindefendo de lia subkonscio retenis lin kaj igis lin returnpaŝi pro ŝia pli kaj pli proksimiĝanta diinfiguro. Sed ŝi lin atingis, ekprenis delikate lian manon kaj tiris lin dolĉe al la lito. Li havis nenian

volon plu; la virino nuda antaŭ li lin hinoptis per sia nudeco. Sed alire al la lito li restis pendanta per la alia maniko ĉe la porda anso. Tio fulmrapide lin rekonsciigis.

«Serpento!» kriegis li al ŝi, kaj sin ĵetis el la ĉambro.

En la matenkrepuska horo li revenis. Ŝi estis for.

* * *

La sekvintan posttagmezon li sidis en iu ĉelo de la esplorarestejo, viro anime rompita, korpe premita.

Matene oni estis eltirinta el la rivero virinan kadavron. En vestpoŝo troviĝis bileto diranta:

«Mi devas serĉi la morton en la rivero, devigate de la krueleco de sinjoro Rolf Torsen, via Santorelli 5.

Tio estis ŝia venĝo.

Originale verkita Esperante de

JOSEPH BERGER

Premiita de la XIaj Floraj Ludoj.



Pro... kaj Por...

La XXXVIII^{an} Datrevenon de Esperanto memorfestis la agema Barcelona Societo «Paco kaj Amo» per ekskurso tuttaga al Bosc de Càn Feu (Sabadell), kie oni amuziĝis kaj paroladis pri nia afero al gesamideanoj kaj publiko. El la Alvoko por tiu festo ni ĉerpas la trafan penson jenan: «Ni multe ĝoju ke tiun internan ideon sentis homo kapabla solvi la problemon de lingvo internacia». Ni aldonu ke la profunda sentado de tiu interna ideo rekaptigis la Majstron solvi la problemon. Kaj aldonu ni fine ke neniu samideano kiŭ ne povas sin kredi pli vera geniulo ol Zamenkof, povas difini pli bone ol la Majstro tiun internan ideon, laŭ kiu, Esperanto estas la *dua* lingvo de ĉiu homo, la *helpa* lingvo internacia, kiun ni ĉiuj devas lerni plej bone, sed ne konkurigi kun la natura lingvo de ĉiu popolo, se ni deziras eviti limigon de Esperantujo al *nova* nacio, anstataŭ celi ke Esperantistujo ampleksu la tutan homaron.

La revigliĝinta enurba societo «Barcelona Stelo» organizas, krom novaj kursoj de Esperanto, serion de paroladoj en Esperanto. Bona tasko: Praktiko estas nepre necesa por utila lerno de lingvo. La gramatiko estas pli komprenebla post la praktiko. La praktiko lernigas kaj la gramatiko komprenigas.

Ĉiuj Grupoj kaj Societoj Esperantistaj en nia teritorio pretiĝas por novaj pacaj instruaj bataloj por Esperanto. Tre rimarkinda estas la agado de la Aplec Esperanto Grupo en Sabadell. Niaj tieaj samideanoj per eldonado de «La Semisto», okazigo de paroladoj, festoj kaj kursoj, pravas efektivan fervoron por nia sankta afero.

Impresoj

Kiam mi sciigis al miaj amikoj mian intencon iri Hispanujon, granda estis ilia surprizo. Iri al Barcelona, kie, laŭ ĵurnaloj, ribeladoj estas ĉiutagaj okazoj, kie pacemaj civitanoj estas senkaŭze pafiltruataj, kaj bomboj eksplodas ĉe ĉiu stratangulo mortigante arojn da senkulputoj!

Kiel kutime antaŭ ol viziti fremdan landon, mi serĉis informon en biblioteko, sed ho ve! priskriboj estis maloftaj kaj malnovaj, kaj tute ne kuraĝigaj. Laŭ ili, malpureco kaj insektoj kaŝiĝas en la hoteloj pretaj por la nesuspektema vojaĝanto kaj pro la samaj kaŭzoj vojaĝado nur estas ebla per la unua klaso; la oficistoj estos malĝentilaj kaj arogantaj, kaj la loĝantoj mokas la malmultajn vizitantojn, kiuj kuraĝas eniri ilian landon. Firme fermante la gvidlibron kaj surdiĝante al la amikaj avertoj, mi asertis ke Esperantistoj trovas ĉie amikojn, kaj kun gaja koro mi enŝipiĝis survoje al la civito kiun la famkonata Don Kihoto nomas «la floro de la plej belaj civitoj de la mondo».

Trapasinte Parizon, la 15 de majo, mi konatiĝis kun kataluna samideano S-ro Gili Norta, kies rideto certe ĉarmus kaj ensorĉus la plej malmolkoran drakon.

Tagmeze, la 17-an, majon mia kunvojaĝantino D-rino Grogan, kaj mi malgaje starante sur la trotuaro ĉe Narbonne stacidomo, ĝoje aŭdis denove lian amikan voĉon, el la ĵus el Parizo alvenanta vagonaro. Niaj zorgoj finiĝis.

Tre ĝentile la doganistoj traktis nin kaj baldaŭ ni troviĝis en tria-klasa kupeo de hispana vagonaro, kies poluritaj lignaj benkoj kaj plankoj estis tute puraj, kaj kies flankbretoj estis pli konvenaj kaj sendanĝeraj ol la superkapaj retoj de alilandaj vagonaroj.

Kun granda intereso ni rigardis la grandiozajn Pireneojn neĝpintitajn kaj florblanditajn. Genisto, la nacia floro, diantoj, kalendoloj, meliloto, grandaj purpuraj konvolvoloj kaj amasoj da papavoj ravis la okulojn; ankaŭ ni vidis la famajn korkarbojn. Inter la tuneloj ni estis ĉarmitaj per la maro, la Mediteraneo kiu kuŝis sube, trankvila kiel akvarela pentraĵo — blua, lazura, ultramara, verda, kun plej malgrandaj neĝblankaj ŝaŭmflokoj.

Je la 7-a. vespere la suno ankoraŭ hele brilas en mia lando, sed jam estis mallumo kiam ni alvenis en Barcelona. Granda estis mia plezuro kiam al nia vagonaro venis renkonte S-ro. Curto Basté, kun kiu mi, dum kvar jaroj, korespondis. Tuj kaptante miajn pakaĵojn, li kondukis min al la barilo, kie aro da amikaj, parolemaj samideanoj atendis por akompani min en triumfa kaj babilema procesio al Hotel Marina. Senmakulaj muroj, ŝtonaj plankoj kaj blanka tolaĵo en la litĉambroj mute antaŭdiris purecon, kaj, en la mangoĉambroj, belaj rozoj kaj marbildoj aldonis allogon al la bona mangoĵo. De la afabla estro ĝis la bonkora pordisto, ĉiu ano de la hotelstabo estis ĉiam preta min servi. Se tiuj ecoj troviĝis en ne esperantisto, ĉu estas

necese diri ke la samideanoj posedis ilin en supera grado, kaj de la unua ĝis la lasta momento ili ĉion faris por helpi, servi, kaj amuzi nin. Dekseshora vojaĝo post nur duhora dormo tiel lacigis nin, ke kun bedaŭro ni devis malakcepti invitojn por tiu vespero. La proksiman matenon, bela sunbrilo frue tentis nin kaj ni iris esplori la urbon. Vidante belan perspektivon de preĝejo, ni tuj promenis al ĝi en mallarĝa strato, kondukanta al malnova vendejo. Enirante la preĝejon, ni ĉirkaŭpromenis admirante la graciajn arkajojn kaj juvelsimilajn vitraĵojn. Elirante per alia pordo, ni vagadis ĝis la Doktorino timis, ke ni perdis nin, kaj deziris peti informon de preterpasanto, sed ĉar ni sciis nek la nomon de la hotelo nek de la strato aŭ placo sur kiu ĝi staris, ŝi devis sekvi min ĝis ni revenis al budo, kie mi antaŭe rimarkis la, al mi strangan, anoncon, «Estas malpermesate blasfemi». De tie mi facile retrovis la hotelon.

Dum la tri sekvantaj tagoj sub la lerta gvidado de niaj amikoj S-roj. Gili Norta, S. Alberich Jofrè, kaj Curto Basté, ni vizitis la plej interesajn vidindaĵojn, la belegan parkon de Montjuich kie mi ŝatus pasigi multajn tagojn, la famkonatan Tibidabon de kies supro vidiĝas la tuta bele blanka urbo kaj la glora maro, kaj fine la interesan katedralon.

Vespere S-ro. Capdevila kondukis nin al la grupkunveno «Paco kaj Amo», kaj al la Ateneo kie mi plezure konatiĝis kun la multaj samideanoj kies nomojn mi delonge konis. Inter ili estis S-ro Jaume Grau kies «Amaj Poemoj» multe plaĉis al mi. S-ro. Delfi Dalmau kies kunlaboro kun S-ro. Bofill tiel mirinde sukcesigis la festaraĝojn. Ankaŭ mi povis ree premi la manon de S-ro. Rodellar antaŭ tri jaroj renkontita en Londono. S-ro. Kreuz sekretario de la Esperanto-Movado priskribis la konferencojn, sciencan kaj komercan, ĵus okazintajn en Parizo. La gastoj ankaŭ enkalkulis S-ron Firkle el Bratislava, Sinon. Hrabáčková el Zlín kaj S-ron Berger el Córdoba.

Vespere la 21-an. majon, akompanata de aro da samideanoj, ni enŝipiĝis sur «Mallorca», kaj mi ĝuis mian unuan vojaĝon sur la glata, trankvila Mediteraneo. La freŝa aero estis tre bonvena post la granda varmo de la urbo, kaj kvankam la transiro daŭris ĝis la 7-a. matene, la temperaturo ne malaltiĝis kiel sur la Manĉo (maro inter Francujo kaj Anglujo). La unua ekvido de Mallorca Majorko okazis je la 4-a. matene, kaj dum tri horoj ni preterpasis rokajn bordojn kaj elstarantajn insulojn, kaj fine eniris la belan havenon de Palma, kies blankaj domoj kuŝiĝis oriente de la malnova kastelo Bellver, kaj la pitoreska Katedralo.

Babilema aro da Esperantistoj amike bonvenigis kaj helpis nin. Danke ni nin trovis en la trankvila Hotel Inglés kie tre agrabla hotelestro zorgeme studis ĉiamaniere niajn komforton kaj bonstaton. Rapide sekvis vizitoj al la urbaj eminentuloj, la urbestro, la provincestro kaj deputitaro. Ĉie ni estis afable akceptitaj kaj kondukitaj tra la belaj ĉambregoj por vidi la arĥitektajojn, bildon kaj artobjektojn.

Sekvate de scivolaj rigardoj, ni promenis laŭ antikvaj sunbrilaj stratoj, suprenirante kaj malsuprenirante la krutajn vojojn ĝis la preĝejo de S-a.

Francisko, kie la Episkopo kaj du pastroj en belaj vestaĵoj solenis la Meson, kaj poste Pastro B. Font predikis Esperante. Ne sciante ke ni ne revenos al la hotelo, mi estis sen ĉapelo pro la granda varmeco, do mi ne sciis kion fari kiam mi min trovis sur la ŝtuparo de la preĝejo. Feliĉe mi portis mallarĝan puntaĵon surŝultre, do samideanino sugestis, ke mi metu ĝin sur la kapon, kaj tiel mi estis dece kovrita, kaj malgraŭ la avertoj de gvidlibroj, neniu eĉ ridetis pro mia stranga kapkovraĵo.

Ree, en brila sunlumo, procesis ĝis la «Kulturdomo» por la malferma kunsido de la kongreso, kaj poste al la Esperanta Ekspozicio ĉe la Palma Klubejo, kie matene ni ricevis insignon kaj bone presitan gvidlibron, enhavantan plenan informon kaj belajn ilustraĵojn.

Mi kompatis la ekzamenotojn kiuj faris sian eblon por kontentigi la ekzamenistojn en la posttagmezo de tiu varmega, plenplena tago. Glora sunbrilo heroldis la festan tagon kaj post bona ripozo, ni gaje kunigis por matenmanĝo. Je la 9-a. la laboremuloj troviĝis en la alloge malvarmeta kunveno por la ferma kunsido. Poste ni rapidis tra la homamaso al la «Teatro Principal» por festi la «Floraj Ludoj'n».

Sidante sur komfortaj seĝoj, ni rigardis la eminentulojn maldekstre sur la scenejo sidantajn, kaj la juĝintaron dekstre. Bedaŭrinde la poeto, Sro. Artur Domènech, kiu gajnis la naturan floron, ne povis ĉeesti, do nia afabla amiko, Sro. Joan Gili Norta, anstataŭis lin, kaj baldaŭ ni vidis lin gracie kondukantan la ĉarman reĝinon, F-inon Catarina Montaner. Tre bele ŝi aspektis en blanka atlasa robo, kies longan trenajojn portis du feinsimilaj knabinetoj. Sur ŝia or-blonda hararo brilis ĉielarke kroneto, kaj enmane ŝi portis blankan rozbukedon. Sekvis ses blankvestitaj korteganinoj kies brunaj hararo kaj okuloj plej trafe kontrastis kun la blondeco de la reĝino.

La muzikistaro ludis «La Espero» kaj ĉiu stariĝis ĝis la reĝino suprenirinte la estradon, sidigis sur la tronon kun la korteganinoj ambaŭflanke kaj la knabinetoj sur la ŝtupoj. La premiita ampoemo estis legata de Sro. Gili. La sekretario Sro. S. Alberich Jofrè legis la raporton de la juĝintaro kaj la sukcesintoj venis unu post la alia por ricevi la premiojn, de la reĝino, al kiu laŭvice la du knabinetoj ilin portis. Kiam venis mia vico, la distanco inter la reĝino kaj mi ŝajnis tre longa, sed la ĉeestantaro laŭte aplaudis, sciante ke mi longe vojaĝis por ĉeesti la feston, kaj tio kuraĝigis min. Iamaniere mi sukcesis riverenci al la reĝino, la eminentuloj kaj la juĝintaro, kaj eĉ aldonis alian por danki al la samideanoj, ilian varman akcepton.

Mi ĝojis aŭdi la nomojn de F-ino. Briggs, Sro. Berger, Julio Baghy, kaj aliajn bone konatajn nomojn, sed certe la plej ofta nomo estis Sro. Jaime Grau Casas kiu legis aŭ deklamis kelkajn el siaj belaj poemoj tiel simpatie kaj klare, ke ĉiu vorto estis aŭdebla.

La juĝintaro sendube havis grandan laboron, ĉar cent dek-unu verkoj konkursis por la kvardek tri premioj. Bedaŭrinde la prezidinto Dro. Kolomano de Kalocsay ne povis ĉeesti sed ni aŭdis lian profundan kaj riĉenhavan paroladon, kiun legis Sro. Dalmau.

La Floraj Ludoj fermiĝis. Ĉiu iris al la pordoj por saluti la reĝinon kaj korteganinojn, kiuj en dekoraciita kaleŝo rondiris la urbon ĝis la Grand Hotel kie la festeno okazis.

Jen belega ĉambro, belaspektaj tabloj parfumitaj per amaso da rozoj, geranioj, kaj aliaj floroj. Ĉiu prenis rozon sed la amaso ŝajnis ne malpliigita. Allogaj pladoj aperis kaj malaperis; tre plaĉis al mi la bongustaj fruktoj, kaj la specialaj kukoj de Mallorca.

Elokventaj paroladoj sekvis, sed ĉar ili precipe estis en la kataluna lingvo, mi nur komprenis la sentojn pro la aplaŭdo. Tamen subite mi aŭdis de la malproksima estrado, mian nomon. Kion fari? mi demandis proksimumon. «Respondu» ŝi diris. Trafe diris Shakespeare, «Kelkaj personoj naskiĝas famaj, kelkaj atingas famon, sur aliajn, ĝi estas altrudita». Sur min, simpla kongresano, turniĝis ĉiu okulo. Vole-nevole mi devis fari mian eblon por danki tiujn ridetantajn bonkorulojn. Estas direkto «El la abundo de la koro parolas la buŝo». Mi esperas, ke ili ne faksis la varmecon de miaj sentoj per la malmultaj vortoj kiujn mi eldiris, ĉar efektive el mia tuta koro, mi deziris danki ĉiujn, kiuj tiel amike akceptis min. Elpasante unu el la gastoj alproksimiĝante al mi, petis ke mi diru kelkajn anglajn vortojn al ŝia filino kiu tre kontente alparolus min. Granda estis mia surprizo kiam ŝi min prezentis al la reĝino. Unuavide ŝia beleco impresis min, sed konstatinte ŝian delikatan ĝentilecon kaj lingvistan kapablon, plej alte mi estimis ŝin.

La komitato ne nur zorgis pri nia korpa bonfarto sed ankaŭ aranĝis anĝman festenon. Unue ni aŭskultis bonegan orkestran muzikon en la Teatro Lírico, kaj poste ni revenis al la Teatro Principal por aŭdi la ŝatindan kant-programon de la Orfeo Mallorquí. La koncerto komenciĝis kaj finiĝis per «La Espero», kaj tiuj kiuj aŭdis la tri strofojn bele kantitajn povis konstati la meriton de tiu melodia ario.

Neniam mi travivis tiel plenplenan ĝuindan tagon, la aranĝintoj meritas grandan laŭdon, ĉar la tuta ceremonia festo iris glate kaj digne sen interrompo aŭ kontraŭaĵo.

La solena festo, la gaja festeno finiĝis sed la amuzado daŭris. Mi ne povas dece priskribi la mirindan veturadon al Miramar kaj Sóller, la danĝerojn de la kurbiganta, montara vojo, ĉiujn sukcese venkitajn de nia sperta veturigisto, la prefervortan belecon de la vidaĵoj ĉe Sóller, aŭ la grandan surprizon kiu atendis min tie, kiam el la manoj de la amika prezidanto, Sro. Miquel Arbona, mi ricevis donace la belajn fruktojn donitajn de la Sóller grupo. Mi kaptas la okazon por ree esprimi korajn dankojn al tiuj afablaj samideanoj.

Alia ĝojplena tago sekvis. Gaja karavano per vagonaro kaj aŭtomobiloj ekskursis trans la sekan, olivportantan kamparon, orienten ĝis la marbordo de Manacor, mirindaĵo el mirindaĵoj, kie ni vagadis tra unu mistera, song-simila kaverno al aliaj, fine vojaĝante multajn metrojn sub la tero, sur la plej belega imagebla lago; la magnesia lumo montris al ni centojn da longaj pendantaĵoj, ĉielarke brilantaj, strangajn formojn kaj figurojn, similajn al drakoj, feinoj, gigantoj, floroj, kaj groteskaj bestoj. Tre profunda ialoke es-

tis la akvo sed klara kaj travidebla kiel nenia surtera akvo. Scivole ni rigardis la vastan plafonon miregante pri la potenca povo de l' naturo. La tuta efekto estis nepriskribeble belega sed timiga, kaj malgraŭ ĝia grandiozezo, ni plezure revenis al la varma sunbrila tersupraĵo.

Post la tagmanĝo iom da tempo restis, kaj nia afabla kongresprezidanto, Sro. Narciso Bofill, sukcesis havigi al ni du paroĵn da majorkaj dancantoj. La dancoj mem estis okultrafantaj, sed kia sceneĵo!

Ni sidis sur benkoj ekster la restoracio, ŝirmataj kontraŭ la varmegaj sunradioj per vasta laŭbo de vinujo, figarboj, rozoj kaj lonicero. Ambaŭflanke ĉe malgranda distanco sidis kamparaninoj kun infanoj. Maljuna kamparano ludis sur gitarosimilan muzikilon kaj kantis la dancaron; malantaŭ la dancantoj estis la blanka sablaro kie fiŝistoj flikis retojn kaj virinoj lesivis tolaĵon kaj de tie etendiĝis ĝis la horizonto, la dormanta, perlumata maro. Surtera Paradizo!. Kiam la mallorcaj dancoj finiĝis kaj la gravmienaj virinoj reprenis sian laboron, niaj amikoj prezentis al ni, la Sardanon, katalunan dancon tute malsimilan, tre gracie. La mallorcaj dancoj estas pli antikvaj ĉar ili montras la ĉasadon de virino per viro, sed la Sardano prezentas tiun feliĉan epokon, ankaŭ malnovan, kiam viroj kaj virinoj malpeze kaj gracie partoprenante la vivon, kunlaboris kaj kunludis kiel egaluloj.

Mi ne povas forgesi la novan grupon kiu gajigis la revenvojaĝon. Kun seriozaj vizaĝoj sed gajaj voĉoj la moŝta grupo da Skarabaĉoj mallongigis la veturadon per iliaj spritaj kantoj. Mi ne povas klarigi la signifon de la nomo, eble ĝi devenas de skarabo, insekto rimarkinda pro ĝiaj kruroj, kaj esprimas la ideon, ke la grupo estis trioble pli vigla ol ordinarioj, kion certe atestos tiuj, kiuj vidis ilin danci aŭ aŭdis ilin kanti. Sed la sufikso «aĉ» anstataŭ esprimi malestimon, enhavis nuancon de amemo. Longe vivu la skarabaĉaj moŝtoj!. Mallumo atingis nin survoje kaj baldaŭ la feliĉaj festintoj ariĝis surŝipe por la hejmenvojaĝo.

Interspaco montriĝis inter la kajo kaj la ŝipo. Aŭdiĝis esperanta kanto, adiaŭkrioj, salutoj, kaj la maro forportis en la nokton la vizitintojn el la sukcesplenaj Floraj Ludoj de 1925.

Kun dankema koro mi travivis tian belan sperton, mi revenis al Barcelona, bela en la matena lumo. Hejmenreveno ĝi vere estis, ĉar la afablaj samideanoj faris ĉion eblan por feliĉigi min dum mia plua restado. Kiel granda estis mia plezuro kiam mi vizitis la hejmojn de miaj amikoj, efektive partoprenante kaj komprenante la hejman vivon de Katalunujo, kiel neniu povas kiu nur rigardas ĝin el hotelaj fenestroj. Mi nur bedaŭris, ke la mallonga tempo ne permesis al mi akcepti ĉiun inviton de miaj bonkoraj amikoj. Kiam mi vizitis la plej junan sed tre vigan katalunan esperantiston, Everest Alberich, kaj la amindan Teresino Curto Marfull, mi konstatis ke la infanoj estas ĉiam saĝaj kaj scias legi kaj kompreni la koron, eĉ sen vortoj.

Adiaŭ, karaj gesamideanoj de Katalunujo, mi neniam forgesos viajn ĉarmajn bonkorecon kaj amikecon, kaj mi ĉiam kantos laŭdojn al via bela lando!

Emma L. OSMOND

Baleara Movado

Datreveno de la Esperantista Klubo Palma, kaj Honoro al S-ro Bofill

De post nia XII^a Kongreso, sukcese organizita de nia tiea pioniro Narciso Bofill, en tiu belega insularo, nia movado daŭre progresas.

Memore al la XIX^a datreveno de la fondo de la Palma Klubo kaj honore al nia samideano Bofill, okazis belaj festoj en Palma post nia Kongreso. Solena estis festeno okazigita en Hotel C  s Catal   kiun prezidis la honorato.

Multaj Grupoj Esperantistaj el nia federacia teritorio sendis aliĝon kaj saluton, kiujn oni legis kaj aplaŭdis.

Josep Rosell  , nia kara amiko Prezidanto de la Palma Klubo, elokvente paroladis pri la grandaj klopodoj kaj meritoj de la glora organizinto de la K. E. F.-a Kongreso en la Baleara   furbo. Ankaŭ paroladis la Prezidanto de la Grupo en S  ller, nia estimata samideano Miquel Arbona. Joan Sancho,   atata Palma kunbatalanto memorigis pri nia malnova amiko Joan Barcel  , kiu malfeli  e de antaŭ jam multaj monatoj troviĝas en Maroko pro milito. S-ro Canals paroladis nome de la organizintoj de la Festeno. S-ro Massanet laŭdis la bonajn ecojn de S-ro Bofill.

Bela albumo memoriga de la Honoro estis donacata al la honorato. Kaj fine tiu-  i, nia neforgesebla organizinto de la K. E. F.-a Kongreso en Majorko legis longan, dankan, fervoran, emocian paroladon.

Estis multaj aplaŭdoj.

Orkestro ludis pla  egajn muzikaĵojn.

Belaj floroj ornamis   arme kaj odoris rave sur la tabloj.

  urnaloj kaj gazetoj el Majorko propagande kaj laŭde raportis.

—

Post kelkaj tagoj nia seulaca Bofill paroladis pri Esperanto en la urbeto Consell, kaj atingis sukceson por nia afero.

Resume: niaj balearaj amikoj semas, semadas por Esperanto kaj meritas nian gratulon, nian simpation, nian laŭdon.

—

BALEARA KARAVANO   eestonta nian proksiman Kongreson en Santa Coloma estas organizata de nia kara Bofill. La nomo de   ia organizanto certigas pri granda sukceso.

  i-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

III^a Iberia Kongreso Esperantista en Kordovo 10-12^a Majo 1925

Ĉeestinte la 3^{an} Kongreson de Iberiaj Esperantistoj en Kordovo, kiel delegito de K. E. F., estus mia devo raporti detale pri tiu okazintaĵo por ke niaj federaciaĵoj sciigu pri ĉio en ĝi pridiskutita kaj informigu pri la ĝenerala movado en Iberlando. Sed mi ne povas fari tion detale, tial ke (mi tion bedaŭras) mia restado en Kordovo daŭris nur unu tagon. Pro tio mi nur ĉeestis la solenegan malferman kunsidon. Pri ĝi kaj pri miaj personaj impresoj, do, jen ĉi-tiuj mallongaj notoj.

Kun kora afableco kaj samideana ĝentileco mi estis akceptata, en la bela kongresurbo, de la tieaj samideanoj, ĉe Sroj. Serrano Obregón, la senlacaĵ batalantoj. Tie mi havis okazon resaluti malnovajn konatulojn, nome, Sroj. Luque kaj Azorin, ambaŭ fervoraj laboremuloj por nia afero en la andaluza lando. Vespere mi salutis la ceterajn kongresanojn dum la interkonatiga kunveno, okazinta ĉe »Círculo de la Amistad».

Antaŭe, en Madrido, mi estis vizitinta la kastilan pioniron, komandanto Mangada, kiu frate kaj samideane brakpremis min. Post longa interparolado kun tiu entuziasma kaj homarama esperantisto, mi eliris la konvinkon ke nur reciproka malkompreno estas la kaŭzo de ĵusaj bedaŭrindaj atakoj, diskutoj kaj publikaj skandaloj inter li kaj katalunaj esperantistoj. Mi sincere opinias ke kiam kun la afero esperanta oni volas kunligi patriotajn, pli bone, ŝovinistajn idealojn, tuj neeviteble aperas la ĝermo de konkuroj kaj malamo, precipe en landoj kie la oficiala politika ŝtato ne alkonformiĝas kun la nature naciaj aspiroj kaj idealoj de ĉiuj landanoj. Intermiksi kun la propagando por Esperanto, propagandon por la unueco de la Ŝtato, en landoj kie nur trude kaj perforte, konsekvence malame, estas akceptata la oficiala politika Ŝtato, en landoj kie ne oni sentas unuecon gentan nek nacian kun la aliaj landanoj de la sama Ŝtato, en landoj kie patruja amo signifas amon al natura lando, al sammora, al samlingva lando, ne al artifika, politika kunmikso de la landoj kun diversaj moroj, malsamaj lingvoj kaj kontraŭaj idealoj, laŭ mia opinio, estas kontraŭefika laboro, trafonta nur malsukceson. Pri tiu temo kaj sur paĝoj de K. E. F. mi promesas dediĉi al S-ro. Mangada, en venonta numero, artikolon, kun la espero ke ĝi kontribuos al repaciĝo por bono de Esperanto kaj Homaranismo. Homaranismo ja neniel akceptas altrudon, ĉu religian, ĉu patrujan, ĉu politikan ĉu lingvan.

En la malferma Kunsido, preskaŭ ĉiuj paroladoj, ĉefe tiu de S-ro. Mangada, estis elokventaj, varmaj kantoj en hispana lingvo al la gloraj pasintaĵoj de la hispana raso. Aŭdante tiajn patriotaĵojn mi min ofte demandis ĉu mi ĉeestas malferman kunsidon de esperanta kongreso aŭ simple kunvenon de varme elokventaj patriotoj.

Mia esperanta paroladeto estis simpla saluto de la K. E. F.-anoj kun esprimo de bondeziroj, laŭ jenaj vortoj:

«Karaj gesamideanoj:

«Ĉar Kataluna Esperantista Federacio ne apartenas al Iberia Konfederacio, la rolo de mi ludota en ĉi-tiu solenaĵo estas tre simpla. Jen:

«Mi portas al vi la varmajn, la korajn, la sincerajn salutojn de la anoj de K. E. F. Akceptu ilin bonkore kaj ne kredu ke nia rifuzo aparteni al Iberia Konfederacio devenas de malestimo aŭ malamo. Tute ne; ni, la K. E. F.-anoj amas ĉiujn homojn, ĉar kun esperantismo ni sentas homaranismon, kaj ni amas kun prefero la esperantistajn homojn, kia ajn estu ilia nacio, ilia lingvo, ilia religio, iliaj politikaj kredoj. — Ni estas spirite kun vi, eĉ ne apartenante al via organizaĵo; ni deziras ke viaj klopodoj por Esperanto, en la teritoria kampo de via agado, sukcesu kaj estu riĉe fruktodonaj. — Viaj sukcesoj, viaj triumfoj, ĝojigas nin kvazaŭ ili estus sukcesoj niaj, triumfoj niaj: ja ili estas sukcesoj kaj triumfoj de Esperanto.

«Ricevu, estimataj gesamideanoj, bonkore, sincere, kaj lojale miajn vortojn: sincere kaj lojale mi diras ilin. — Kataluna Esperantista Federacio estas ĉiam preta kunlabori kun iu ajn organizaĵo, por la propagando kaj disvastigo de la komuna ideo, kaj por tio ĝi ne bezonas, nek deziras ke oni invoku alian titolon ol tiun de Esperantisto».

Tial ke mi estis la unika kataluno parolinta, imagu mian surprizon, kiam lastmomente el inter la publiko sin prezentis sur la strado iu, kiu kun afektema emfazo kaj grandoratoraj gestoj, deklaris ke li alprenas la parolon je la nomo de la *aŭtentikaj kaj ne hipokritaj katalunoj*. — Jen samideanoj de K. E. F., vi, en kies nomo kaj reprezento mi estis parolinta, ĝentile salutante la Kongreson, ne estas aŭtentikaj katalunoj, sed hipokrituloj. La *aŭtentika* kataluno estas tiu, kiu por pravigi sian aŭtentikecon, atribuis al si la reprezenton, kaj uzis la nomon de estinta Barcelona organizaĵo **kiu jam ne ekzistas**. — Li deklaris la aliĝon de tiu mortintaĵo al la Kongreso. Bona akiro por Iberia Konfederacio! — Cetere, la parolado de tiu aŭtentika kataluno, konsistis el sulfice longa ditirambaro al la gloroj de Hispanujo, en hispana lingvo. — Oni aplaudis lin. Neniu el la kongresanoj malaprobis la insulton tiel klare kaj publike faritan al la esperantistoj de K. E. F. en tiu solena kunsido. Unuamomente mi intencis mem tion fari, sed post rapida pripensado mi decidis silenti por ke neniam oni povu diri ke K. E. F. sendis delegiton al la Kongreso por malhelpi ĝian sukceson. Post la malferma kunsido mi malaperis el la kongresurbo, nerimarkite kaj adiaŭbinte neniun, por eviti klarigojn, kaj veturis al Seviljo, kie familiaj aferoj min postulis.

Se mi estus povinta partopreni laboran kunsidon, jen kion mi estus dirinta al la hispanaj samideanoj kun la sama lojaleco kaj kataluna klareco de mia saluto:

Ne malestimo nek malamo, sed aliaj, estas la kaŭzoj de nia sintenado rilate al la Iberia Konfederacio. Hodiaŭ estus malpermesate paroli pri tiuj kaŭzoj, pro la specialaj cirkonstancoj regantaj nune en la Hispana Ŝtato.

Se tiaj cirkonstancoj ne malhelpus nin paroli klare, mi havas la certe-

con ke vi ĉiuj konsentus pri la logikeco de nia sinteno kaj ke vi ĉiuj restus konvinkitaj pri la lojaleco de nia konduto.

Nur mi dirus ke unu el la kaŭzoj de nia rifuzo aparteni al la Iberia Konfederacio, konsistas el la sincera kredo ke tiu konfederacio estas nenecesa kaj malmanka. — Estas vero, ke antaŭtempe K. E. F. iniciatis la starigon de Hispana Konfederacio, kies nomo estis poste ŝanĝata je tiu de Iberia Konfederacio, kun plena kontentiĝo de la katalunoj. Estas vero ke en la unua kaj dua Kunvenoj de Esperantistoj de Iberiaj Landoj en Barcelona kaj Zaragoza, K. E. F. partoprenis la diskutojn kaj eĉ proponis plenan regularon por la starigota konfederacio. Sed mi devas atentigi vin, hispanaj samideanoj, ke ĉio ĉi-tio okazis antaŭ la Universala Kongreso en Helsinki, kie oni starigis novan organizadon de la tutmonda esperantistaro. Laŭ tiu organizado, la landaj federacioj kotizas difinitan procenton al centraj institucioj, laŭ la nombro de siaj anoj. Kataluna Esperantista Federacio, tuj aliĝis al la nova regularo, kaj de tiam ĝi kotizas sian procentaĵon. Se ni aliĝus al Iberia Konfederacio, oni devus difini kroman procenton pagotan de K. E. F. al I. K. Ni ne povas akcepti tion, ĉar tio malebligis la ekzistadon de K. E. F., de la financa vidpunkto.

Nek ni povas akcepti ke K. E. F. ĉesu sian kotizadon al K. R. kaj ke faru ĝin la Iberia Konfederacio, konsiderante ĝin kiel landan organizaĵon, ĉar ni volas konservi nian propran personecon antaŭ la tutmonda esperantistaro, kiel plena, kompleta organizaĵo de plena, kompleta lando.

Sed pli ankoraŭ mi diras. Eĉ se ni ne devus pagi al I. K., ni ankaŭ konsiderus neoportune aliĝi al ĝi. Jen la kialo: Por ke la publiko, por ke la loĝantoj de iu ajn lando sin sentu altiritaj al ia ajn doktrino, estas nepre necese ke tiu doktrino ne estu malkonforma kun la publika opinio nek kontraŭstaru la inklinojn, la sentojn, la idealojn de la plejmulto el la landanoj, kaj estas tre efike se tiu doktrino prezentas solvojn al la landaj problemoj. — Pro tio, nur pro tio, Esperanto kreskas kaj disvastiĝas tiel firme en Katalunujo, tagon post tago, nuntempe rapidege, ĉar ĝi prezentas logikan kaj justan solvon al la lingva problemoj, ĉar ĝi ne kontraŭstaras la idealojn de la plejmulto el la katalunoj. Tio kio plej bone konvinkas la katalunojn estas nia devizo: *«Kun samnaciaĵoj, la propra lingvo; kun alilingvanoj, Esperanto. Esperantismo ne akceptas altrudon de lingvoj»*.

Nia sincera opinio estas, ke la federacioj ne devas esti bazitaj sur naciaj, ŝtataj, teritoriaj, politikaj, historiaj nek religiaj konsideroj. Esperanto estas lingva afero. La neceso eviti la malbonaĵojn devenantajn de la diverseco de lingvoj inspiris ja al nia Majstro la kreadon de Esperanto.

Do, ni bazu niajn federaciojn sur lingvaj bazoj: Federacio de hispanlingvanoj, Federacio de basklingvanoj, Federacio de katalunlingvanoj, k. t. p. — Kaj ĉiu federacio estu sendependa, sen alia ligilo kun la aliaj federacioj ol la komuna fervoro por Esperanto, kaj la mutua, amika kunhelpo en la laborado.

Ĉi tiujn vortojn mi estus dirinta en labora kunsido, sed mi ne havis

okazon fari tion. Tamen mi profitis oportunaĵon konigi ilin al S-ro Manga-da, la kastila pioniro, kiu aŭskultis ilin atente kaj ĝentile, sed ne esprimis sian opinion. Poste mi legis ke la Kongreso decidis ne starigi Iberian Konfederacion, sed Hispanan Asocion.

Mia persona opinio estas ke pli oportuna estus kastila Federacio, por ĉiuj kastillingvaj teritorioj de la duoninsulo, sed la kongreso ne atentis pri la lingva problemo kaj konsideris nur la oficialan politikon de la Ŝtato. Al ni, katalunoj, devas esti indiferenta la nomo ĉu kastila ĉu hispana, ĉar ni havas nian amatan «Kataluna Esperantista Federacio», kiu estas nia landa, sendependa organizaĵo.

Ni deziru, la katalunaj esperantistoj, bonan sukceson al la hispanoj.
Vivu la Hispana Asocio! — ARTUR DOMÈNECH I MAS

LES NOCES DE L'ALOSA I EL LLESSAMÍ

Glossa

«Quina taula tan parada:
estovalles de satí;
les culleres són de plata,
les forquilles són d'or fi!» (1)
Quina taula, pubilleta!
i no em diries per qui?
— L'alosa de la margeda
se'ns casa amb el llessamí.
— A quina hora feu les nocés
que jo hi voldria venir?
— El rossinyol t'ho diria
que ell els ha de beneir
perquè té la veu tan clara
i sap tant de confegir
i duu plomissó de seda
i té après un gest molt fi.
— Força em plauria trobar-t'hi;
posa't ben propet de mi:
aprendrem com fan les nocés
que el saber-ho és mig cami.
— Ahir que l'hora cercaven
no es sabien avenir:
ell volia la nit dolça
i l'alosa el dematí,
que al matí té la veu tendra
i al vespre no sap què dir.
Ell vol la nit i ben clara
perquè duu el vestit més fi
i és obert com una estrella
i el parfum sembla un sospir.

Al roser ho preguntaven:
no gosava decidir;
el rierol se n'enreia;
la menta vinga glatir,
i l'estrella tan llunyana
semblava que fos ací.
Per a fer-los companyia
els han cercat un padri:
un ametlló per l'alosa
i un estel pel llessamí;
la font els diu la doctrina
al vespre i al dematí.
Conten que volen casar-se
al rusc de sobre el molí,
perquè cada abella hi sigui
cirial i violí
i d'encensé una maduixa
que el seu foc no pot morir.
Veus com branda ses campanes
la perera del cami?
Cerca el giponet de rosa,
caputxeta i faldelli
i un brotet de tarongina
que encar sigui a mig obrir.
Que la taula ja és parada:
«estovalles de satí;
les culleres són de plata;
les forquilles són d'or fi.»
Si encara avui no en tens ganes,
prou que te'n faran venir!

(1) Corrandra popular,

La XIII^a Kongreso de K. E. F.
kun la XII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj
okazos en Santa Coloma, la 23-25 Majo 1925

Loka Organiza Komitato: Prezidanto: Josep Canaleta; Konsilantoj: por ekskursoj, Joan Falgueres; por festoj, Joan Brusset; por la Floraj Ludoj, Josep Gener; Kasisto: Joan Solà; Sekretario: Josep Turon. Anstataŭantoj: Salvador Planes, Joan Peric, Lluís Duc, Pere Monràs, Emili Serra, Joan Tornabells. — Honoraj Membroj: ĉiuj lokaj Aŭtoritatoj.

Alvoko

Por la XII^{aj} Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj

Al vi, ĉiulandaj verkistoj, amantoj de esperanta beletristiko, saluton!
La Komitato de la XII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj havas la honoron inviti vin partopreni la jenajn konkursojn:

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. — Originala *ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de la kataluna versaĵo sur paĝo 228 de ĉi-tiu numero.
- II. — Traduko de la jena prozaĵo:
«Caminar amb la Lluna» de Prudenci Bertrana el la libro (paĝoj 141-5)
«El meu amic Pellini i altres contes» eldonita de «Editorial Catalana». —
Prezo ptoj. 2'50.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ (unua listo).

- I. — Premio de la Komitato de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Interna ideo de Esperanto.
- II. — Premio de la Redakcio de «Kataluna Esperantisto»: 75 pesetoj. Temo: Fideleco al la Fundamento de Esperanto.
- III. — Premio de S-ro Narciso Bofill de Palma de Mallorca: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- IV. — Premio de S-ro Miquel Argemí de Terrassa: 100 pesetoj. Temo: Laŭvolà.

V. — Premio de Universala Esperanto-Asocio: 100 pesetoj. Temo rilatanta al U. E. A.

VI. — Premio de la grupo «Barcelona Stelo»: 25 pesetoj. Temo: Laŭvola.

VII. — Premio de Dro. Sekretulo: 75 ptoj. Temo: Laŭvola.

Novaj premioj estos anoncataj al la Komitato, kaj ni ilin publikigos en la proksima numero de «Kataluna Esperantisto».

(Ni petas ĉiujn societojn kaj privatulojn bonvolajn, tuj anonci al ni siajn premiojn kaj temojn por la proksimaj Floraj Ludoj).

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

D-ro. Edmond Privat, *prezidanto*. — Joseph Berger. — Josep Rosselló. — Artur Domènec. — Josep Gener. — Josep Ventura, *sekretario*.

NOTOJ

I. — La aŭtoroj de la du premiitaj Originalaj tekstoj I-II, kaj tiuj de la du premiitaj Tradukitaj tekstoj I-II, ricevos bele binditan ekzempleron de la verko «Kataluna Antologio». Krom tio estos donacata al ĉiu laŭreato atesta diplomo.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versajo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinarnaj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo.

III. — La verkoj konkursontaj devas esti verkitaj en bona Esperanto, kaj ne ankoraŭ eldonitaj aŭ anoncitaj.

IV. — La soleno de la XII^a Floraj Ludoj okazos en Santa Coloma de Farnés dum la XIII^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio».

V. — La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevitaj antaŭ la 15 februaro 1926 ĉe la Sekretario de la Floraj Ludoj, (S-ro. Josep Ventura, Carrer Creu, 75 - Terrassa) akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. — La manuskriptoj ne estos resendataj eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj. Ĉiu sendinto bonvolu konservi kopion de la manuskriptoj.

VII. — La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu konkurso.

VIII. — La Komitato publikigos la verdikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. — La verkoj premiitaj fariĝos proprajo dum unu jaro, de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion sen rajto al efektiva premio.

En la proksima numero de KATALUNA ESPERANTISTO ni aperigos liston de novaj eksterordinarnaj premioj kaj temoj.

MI DANKAS

Mi dankas por Mangadaj senkulpigo kaj gratulo, kiujn vi legos tuj en ĉi-suba represa ĉapitro el raporto pri la Ĝeneva Kongreso, subskribita de J. M. R. (Julio Mangada Rosenörn) aperinta en la septembra numero de «La Suno Hispana». Jen la afabla ĉapitro.

«Same, kiel por ĉiuj Kongresoj, la vivo de la XVII^a disvolviĝadis kun malferma kaj ferma ĝeneralaj kunsidoj, la lasta tutplene je la honoro de la Majstro; kun laborkunsidoj, speciale tiuj de K. R. — C. K. kaj U. E. A. dum kies unua, Hispana Esperanto-Asocio havigis al si la rajton kiel membro de K. R., pagante sian kotizon, sufiĉe altan, kaj kaŭzante tiel bonan impreson; ĝi atingis ke ĉio estu laŭ la regularo de la Kongreso, pro kio nur H. E. A. parolis kiel sola *Nacia Asocio*, ĉar alimaniere estus okazinta starigo de politika problemo se Kataluna Esperanta Federacio estus prezentinta sin kiel Nacia Asocio; pro kio ankaŭ parolis vasko, valenciano kaj kataluno, pri saluto je la nomo de siaj lingvoj parolataj en la nacio, krom tiu, kiu parolis je la nomo de la lingvo hispana. Dum ĉi tiu kunsido, ĉar la reprezentanto de Kataluna Esperanta Federacio ne ĉeestis de la unua momento, okazis ne grava diskuto kiam li sin prezentis kaj informiĝis pri la afero kaj ke ne estis kialo por revenigi la aferon al antaŭa diskuto jam finita des pli ĉar la decido estis laŭ Regularo de la Kongresoj. Dum la dua kunveno, tute interkonsente, oni voĉdonis gravajn aferojn, kaj estis honoro al la reprezentanto de H. E. A. malaperigi malkomprenojn de S-ro. Cart okaze de letero, kiun proponis D-ro. Privat, kaj kiun S-ro. Cart, kiel Prezidanto de la Akademio, devis adresi al S-ino. Morris, kaj kies teksto estis elĉerpitaĵo fidela de nia Fundamento. Tiel interesa estis la kunveno, kaj tiel granda estis la unuanimeco ĝin reganta, ke vere ne estis apenaŭ diskutetoj, pro kio D-ro. Privat ekkriis: «Delegitoj de Naciaj Asocioj ne ĉeestantaj la kunvenojn de K. R. ne estas lojalaj al nia esperanta idealo. Ĉiuj devas surporti la respondecon same», mi senkulpigas el ĉi tio dirita de D-ro. Privat la reprezentanton de Kataluna Esperanta Federacio, kaj mi gratulas lin, ĉar, ne ĉeestinte, li elpruvis al mi sian konvinkiĝon pri la eraro konscii Katalunan Esperantan Federacion *Nacia Societo*, pro kio tiuj kunvenoj ne koncernis lin kaj nur la Rezentantaron de Naciaj Societoj aŭ K. R.»

La katalunaj esperantistoj estas malriĉaj. Ĉiuj devas perlabori la ĉiutagan paŭnon korpan kaj kulturalan. La Kataluna Esperantista Federacio elspezas por Esperanto pli ol enspezas de la membroj laŭ la ordinara kotizo kaj abonoj al «Kataluna Esperantisto». Eĉ la presisto de nia gazeto estas ankaŭ tiel malriĉa ke pro manko de presmaterialo kaj monrimedoj okazigas oftajn malfacilaĵojn al apero de K. E.

Nun, ekzemple, okaze de la presado de la granda Kataluna Antologio, vere granda esperanta verko aperonta fine de oktobro, nia gazeto ne povis aperi ununumere ĉiumonate. Plie ni ne havas Ŝtaton pagantan por Delegito de K. E. F. ĉe Universalaj Kongresoj. K. E. F. ankaŭ neniom povas pagi por

tio; kontraŭe, foje niaj reprezentantoj, kiuj devas pagi mem por vojaĝoj de la reprezentado, pagas ankaŭ eksterordinaran kotizon por malaperigo de K. E. F-a defecito.

En la nuna jaro, ĉar mi devis en Ĝenevo ankaŭ labori kaj studi, mi ne povis ĉeesti la duan kunvenon de KR. kiun Infanteria Komandanto Mangada tiel bone raportas. Kaj mi bedaŭras mian foreston, des pli tial ke se estus okazinta ĉeesto mia, li estus decidiginta KR-on ke ĝiaj kunvenoj ne koncernas la Representanton de K. E. F., ke K. E. F. ne estas ĉe KR. kiel la ceteraj aliĝintoj. Mi diziras helpi al Komandanto Mangada klarigi la aferon, kaj mi petas KR-on respondi pri tiu nova rajto-nerajto de K. E. F. laŭ Komandanto Mangada. Ĉiuj Oficialaj Institucioj de Esperanto povas esti certaj de K. E. F. akceptos kaj obeos bonvole ĉiujn justajn decidojn iliajn. Ankaŭ Komandanto Mangada povas esti feliĉa pro certeco pri nia akcepto kaj obeemo al niaj Oficialaj Institucioj: Akademio, Konstanta Representantaro kaj Centra Komitato.

Sed kial Komandan Mangada ne vidigis al KR. ke ne koncernas la Representanton de K. E. F. partopreni eĉ la voĉdonon por la Organiza Statutaro en la unua Kunveno de KR. en Ĝenevo, kiun ni ambaŭ ĉeestis, kaj kie plurfoje estis aludata la voĉdono K. E. F.?

D. D.



Pro... kaj Pro...

La Hispanaj Reprezentantoj. — Por reprezenti Hispanujon ĉe la ĵus okazinta XVII^a Universala Kongreso de Esperanto, en Genève, la registaro nomis S-rojn Staba Leŭt-Kolonelo, Inglada Ors kaj Infanteria Komandanto, Mangada Rosenörn.

«*Tre imitinda ekzemplo.* — La Katalunaj Radiologiistoj, laŭ la iniciato de D-ro Bremon Masgrau, el Barcelono, prezentis al la Internacia Kongreso pri Radiologio, okazinta antaŭnelonge en Londono, la jenau proponon: — «*La subskribintoj, konvinkitaj ke la interkompreno estas la ĉefa afero en internacia Kongreso, dezirus ke, en la venonta Kongreso, Esperanto estu elektata kiel helpa lingvo, plie de la naciaj lingvoj, kaj ke ĉiu dokumento, anonco, komunikaĵo, k. t. p., estu ankaŭ presata esperante.*» — Tiu teksto estis subskribita de multaj eminentuloj en Radiologio, Prof-oj Dessauer (Frankfurt), Friedrich (Friburg), Nemenov (Leningrad), Heuser (Buenos Aires), Carulla (Barcelona), D-roj Case (Battle Creek), Grossman (Leningrad), Torres Carreres kaj Grau (Barcelona), Bosch (Terrassa), k. t. p. La propono transiris al Komitato de Delegitoj: ĉu ĝi sukcesis? Eble, sed la ĉefa afero

estas ke granda parto de la Kongreso sciĝis pri ĝi. D-ro Bremon Masgrau prezentis komunikon rilate al «Prostasta Hipertrufio kaj ĝia kuracado per Radioterapio»; ĝi estas akceptita en Esperanto, kaj en Esperanto versajne vidos la lumon en la publikigota Kongreslibro. — Ankoraŭ pli en la fako, ol en la ĝenerala medicino, lingvo internacia estas tute necesa, kaj ni nepre konfidis al Tekanoj specialistoj por imiti la ekzemplon de D-ro Bremon Masgrau. — N. B. — Pri la radiologio, sciĝinte ke D-ro Wetterer (Institut für Radium and Röntgenbehandlung, Mannheim), preparis gravan internacian verkon kvinlingvan (Index), mi skribis al li por konsili la uzon de Esperanto. Li respondis ke li nur ŝate konsideros mian peton, se multaj fremdaj radiologiistoj esprimas la saman deziron. Mi scias ke kelkaj tion faris, kaj mi invitas ĉiujn radiologiistojn same fari. — (El la gazeto «T. E. K. A.» — Ni gratulas niajn amikojn por la «Tre imitinda Ekzemplo».

Grupo «Barcelona Stelo» Marquès del Duero, 101. — *Ciklo de paroladoj*: (Je la 10^a vespere). 19 Septembro: La afableco de la Londonaj samideanoj, de Josep Grau Cases. — 10 Oktobro: La Ĝeneva Kongreso, de Delfi Dalmau. — 31 Oktobro: Pri la vivo de insektoj, de Joan Amades. — 21 Novembro: Kiam kaj kie ni devas uzi Esperanton: senkonscio de kelkaj esperantistoj, de Jaume Grau Casas. — *Kantista rondo*: Estas fondita en nia Grupo la «Kantista Rondo», kiu estos direktata de nia grupano Conrad Domènec. Li instruos popolkantojn katalunajn kaj alilandajn, tradukitajn en Esperanton, kaj aliajn esperantajn muzikaĵojn. Kunveno: ĉiumerkrede. — *Unuagrada kurso*: Ĝi okazas ĉiujn lundojn, merkredojn kaj vendredojn, de la 9^a ĝis la 10^a vespere, gvidata de samideano Eduard Capdevila.

Respubliko Supernacia. — Formiĝis Komitato por Propagando de la Ideo Supernacia, laŭ la ideoj de S-ro H. L. Follin. Interesatoj petu informojn de la sekretario de République Supranationale, 23 rue la Boetie, Paris 8.

Anarkiistoj. — Sub devizo «Por la anarkiismo per Esperanto» estas fondota «Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj». Informojn oni petu de la adreso: J. M. Esperanto, 9 rue Louis Blanc, Paris 10.

Libro pri kuirarto. — Mi intencas prepari libron pri kuirarto, kiu enhavu priskribojn de ĉiuj plej ĝeneralaj kaj ankaŭ naciaj manĝaĵoj. — Mi petas ĉiujn, kiuj sin speciale pri tio interesas, helpi al mi ĉu per alsendo de materialo ĉu per konsiloj. — Oni sin turnu al S-ino Edmond Privat, 2 Chemin de Roches, Genève (Svisujo).

Aŭtuna Foiro de Frankfurt A. M. — La Foirofiĉejo de Frankfurt dissendas 24-paĝan ilustritan broŝuron en Esperanto, per kiu ĝi provas doni bildon pri la historio de la Varfoiroj de Frankfurt kaj montri la ekonomian signifon, kiun posedas por nia tempo la Internaciaj Foiroj de Frankfurt. Ili sukcesis certigi al si dum mallonga tempo fruktodonan fidon de industrio kaj komerco kaj justigi tiun ĉi fidon. Ilia organizo garantias al ekspoziciantoj kaj aĉetantoj ĉiujn avantaĝojn, kiujn oni deziras de moderna grandfoiro.

Ĉiujn demandojn pri partopreno al la aŭtuna foiro, okazonta de la 4-7 Oktobro, pri foira vizito kaj similaj aferoj respondas volonte la Foiroficejo (Messamt) de Frankfurt-M., Platz der Republik, Germanujo.

Jen Rocamora noto kiu antaŭ kelkaj tagoj aperis en hispanlingvaj ĵurnaloj en Barcelona: *Congreso de Esperantistas de Tierras Ibéricas*. — Elementos pertenecientes a «Barcelona Esperanta Grupo» han nombrado el Subcomité encargado de realizar la propaganda y los trabajos de cooperación para el «IV Congreso de Esperantistas de Tierras Ibéricas», que se celebrará en Madrid el año próximo. El Subcomité de Barcelona quedó constituido por los señores don Rómulo S. Rocamora, don Francisco Gorgues Torredelot, don José Anglada Prior, don Pedro Mayol Aymerich y don Luis Batet y Jufre. Dicho Subcomité ha fijado su residencia en la Gran Vía Layetana, número 13, entresuelo, primera. En la reunión celebrada para la designación del Subcomité se acordó también hacer constar que ni éste ni la entidad «Barcelona Esperanta Grupo» pertenecen ni tienen relación ninguna con la «Federación Catalana Esperantista».

Neniu el tiuj sinjoroj estas hispanlingvano. Hispanlingvaj samideanoj en nia teritorio, kiuj esperantiste kaj amike kunlaboras kun ni en la Kataluna Esp. Federacio, kaj eĉ niaj karaj samideanoj en la hispanlingva teritorio de la Duoninsulo bone konas nian Federacion kaj dece juĝos tiajn publikajn Rocamorajn notojn, el kiuj antaŭ kelkaj monatoj aperis alia sciiganta al la mondo, ke S-ro Rocamora forlasis la esperantistan movadon. S-ro Rocamora estas la fama homo kiu veturis de Barcelona al Córdoba por saluto en la nomo de «los catalanes auténticos y no hipócritas» rajtigita de nenioma Grupo de katalunaj esperantistoj.



Bibliografio

Ni recenzos verkojn duope ricevitaĵn.

LA MALAPERINTA AMIKO. Kontribuo al la pruvaro pri l' identeco de la spiritoj, verkita en franca kaj esperanta lingvoj de Jules Thiebault. Havebla ĉe la aŭtoro, Carignan (Ardennes) Francujo. 97 paĝoj, 21 × 14. Prezo frankite: 5 fr. fr.

La aŭtoro priskribas diversajn scenojn okazintajn en Mantes, kie rimarkinde enkorpiĝis kelkaj spiritoj kiuj donis novan pruvon pri la kodiaŭ ne plu nebla ekzisto de la postmorta vivo. Kiu legis la faman trilogion de Flammarion, tiu ne trovos en la verko multajn novajn detalojn pri la ecoj de la spiritoj, tamen ĝi bone servos por vekti intereson ĉe multaj esperantistoj, kiuj pri la misteroj de la morto ne multe atentis.

Krom la abundaj preseraroj oni trovas en la libro kelkajn lingvajn malperfektaĵojn.

HEJMA PROZO. — Kolekto de rakontoj esperanten tradukitaj de Dro. J. Bremon Masgrau L. K. Eldono de la trakukinto, Barcelona 1925. 64 paĝoj, $17 \times 12 \frac{1}{2}$. Prezo: afrankite 1 sv. fr. — Mendu ĉe Ferran Montserrat, Villarroel, 107. — Barcelona.

KONGRESLIBRO de la III Iberia Kongreso Esperantista, eldonita de la Organiza Komitato. Kordovo, 1925. 50 paĝoj, 21×14 .

RAPORTO de la III Iberia Kongreso Esperantista. Aldono al la pli supre nomita kongreslibro. 42 paĝoj.

Impresoj kaj raporto pri la kongreso de niaj karaj hispanlingvaj samideanoj. Ni gratulas nian karan Berger, kiu verkis la raporton, ke li tiel entuziasme laboris por la sukceso de la kongreso.

LA LASTA KRAVATO DE ALEKSY de S. Balinski. Biblioteko de Pola Esperantisto. El la pola lingvo tradukis Stanislaw Karoloczyk. Warszawa, 1925, 24 paĝoj, $16 \frac{1}{2} \times 12$. Prezo: 50 gr.

Interesa noveleto kun tre vivaj scenoj. Preskaŭ sen preseraroj. La tradukinto bone regas la lingvon, sed mi rimarkis ke pri la adverbo «ĵus» kaj la sufikso «iĝi» li kaj aliaj esperantistoj kavas neĝustan ideon. «Ĵus estis la dimanĉo» pĝ. 17, «ĉu ĵus tio ĉi povus min tiel forte impresi» pĝ. 23. Kial anstataŭ «ĵus», kies signifo estas *antaŭ mallonga momento*, oni ne uzas «ĝuste». «Vestiĝadis» p. 19. «senkulpigadi» p. 22. anstataŭ «vesti sin», «senkulpigi sin». «Fermitajn» (p. 15, linio 7) estas predikateca kaj ne apudmetita adjektivo; sekve la akuzativo estas makulo. «Velkitaj» anst. «velkintaj» p. 23.

ILUSTRAT ABECEDARI del Lingue Medial European, de Josef ed Betti Weisbart. Nürnberg, 1925. 75 pĝ., $16 \frac{1}{2} \times 12$. Prezo: ne montrita.

Nova lingvo pli facila kaj pli bela ol ĉiuj ceteraj lingvoj. Josef kaj Betti povas trankvile «ridi» pri la estonto de la «infante». Ni antaŭvidas la morton de ĉiuj Saussure' aĵoj kaj la triumfon de la nova eŭropa fuŝaĵo.

INTERNATIONAL RADIO MANUAL de Harry A. Epton, eldono de The British Esperanto Association, London, 1925. 80 pĝ. $16 \frac{1}{2} \times 10 \frac{1}{2}$. Prezo: 6 d.

Kun envio oni legas la belegan lernolibron. Se ni povus havi similan, la sukceso de nia kurso de Radio Barcelona havus multe pli kontentigan rezultaton. Gramatiko, vortaro (radio-terminoj), bildoj de radio-simboloj, ĉio estas korekta. Verketo kiu fariĝas verkego antaŭ niaj okuloj.

LA KATALUNA POPOLKANTO. — Studo originale verkita de Joan Amades kaj Jaume Grau Cases. Barcelona 1925. 29 paĝoj, $21 \frac{1}{2} \times 15$. Aĉetebla ĉe la aŭtoro Sro. Grau, Claris, 72, Barcelona. Prezo: 1 peseto.

Krom la studo pri la popolkanto, korekta kaj interesa, la libreto enhavas naŭ versaĵn tradukojn kaj melodiojn, kiuj agrable sonas. Ni esperas ke

la esperantista mondo kun plezuro akceptos la belan verketon. Nian plej koran gratulon al la verkintoj. — SALJO

LA ANGELUSO. — Poezio de H. Lapaire esperantigita de F. de Ménéil
Muzikverkisto: F. Fourdrain. — Prezo: 2 fr. — Deiss Greetin, — 31 rue
Meslay, Paris.

Ĝi estas majstra verko.

Kiam ni aŭskultas ĝiajn revajn notojn, nia spirito supreniras momente el la terspaco. Kaptas nian animon revo pri la sunsubiro kaj en tiuj momentoj ŝajnas ke la tuta naturo moviĝas unusone.

Estas rimarkindaj ĝiaj treege simplaj akordoj tra kies simpleco la muzikverkisto divenis la ĝustan melodion por sentigi tiel grandan emociion ĉe la aŭskultantoj. — P. C.



Tra la gazetaro

Heroldo de Esperanto. — Atentinda estas la numero de la 17^a de la lasta junio, enhavanta du notojn, unu agrablan kaj malagrablan la alian. — La unua. — *La malvera eminentulo*, bela sprita rakonto, verkita de Kristano Mallerta, pentranta la fanfaronulojn sin mem igantajn Eminentuloj. Per facila, simpla, agrabla stilo oni pentras en ĝi, ironie, la agadon de tiaj homoj kiuj sentante sin pli esperantistoj ol la ceteraj, nur laboras je la malebligado de Esperanto. Oni rekomendas al vi, amataj legantoj, ĝian tre atentan legadon kaj eltiru el ĝi la konsekvencon. — Jen la dua: Oni legas en la unua kolono de la lasta paĝo. — *La aliaj.* — «Malgraŭ la protesto de kelkaj legantoj, ni opinias utile, de tempo al tempo, raporti ankaŭ pri la aliaj mondlingvaj projektoj. Rigardante la *diversecon* de la *teoriaj* projektoj, oni des pli sentas la neceson de *unueco* en la *praktika* mondlingva movado, kiu koncentriĝos je Esperanto. Kio koncernas la *perfektecon* de *Ido*, kiu el ĉiuj projektoj faras plej grandan klopodon por krevi la *unuecon*... k. t. p....». Sinsekve de ĉi tio, oni aldonas *bibliografion* pri la diversaj gazetoj kaj revuoj de tiuj lingvo-projektoj. Bedaŭrinde, ni devas atentigi «Heroldo de Esperanto» ke en ĉio tio-ĉi kuŝas granda danĝero por nia lingvo. Per la perioda publikigo de sciigoj rilatantaj la agadon de niaj kontraŭuloj, kion gajnos Esperanto krom la disvastigado de malagrablaĵoj inter la esperantistaro kiujn ni ĉiuj devas malatenti? Des pli ĉar ŝajnas tiu metodo pligravigi ilin anstataŭ malestimi kaj kontraŭstari ilin. Dank' al Dio, ni katalunoj malatentis tiajn insidojn neniam deflankiĝante de la rekta vojo difinita de nia tre kara Majstro en lia Fundamento kaj Regularo, tial en nia kampo ne prosperis la ĝermo de tia malbona grajno. Kian utilon alportas al nia movado, tia afero? Nenian, do, flanken lasu ĝin. — ISTO.

Bulteno. Monata Eldono de la Antverpena por Esperanto Propaganda Komitato, de la pasinta Julio. — Okaze de la 1^a datreveno de ĝia starigo, solene oni festis per gaja kaj fratiga ekskurso al Hemixem, kaj la mem *Bulteno* por solenigi sian fondiĝdaton ankaŭ aperis tute nova, tute festevestita. Antaŭ tia manifestacio de reviglo, de mem konfido, de kuraĝo, ni nepre ne povas ne gratuli ĝiajn fondintojn kaj Subtenantojn; sed, ne nur pro tio antaŭe menciita, estas nia gratulo, ankaŭ pro la novaĵo aperigita en ĝin, jen tia: «*Nia Skabeno pri Publika Instruado*. — S-ro K. Huysmans, kiu estas tre fervora al nia movado kaj kiu enkondukis Esperanton en la oficialajn vesperkursojn estas vokita al la alta posteno de Ministro pri Sciencaj kaj Belaj Artoj. La A. P. P. K. gratulas lin, esprimante la deziron, ke li baldaŭ enkondukos ĝin en ĉiujn gradojn de la Publika Instruado». Ni ankaŭ partoprenas tiun ĝojon kaj gratulas korege la antverpenajn samcelanojn, ĉar, bedaŭrinde, ne en ĉiulandaj registaroj, ni esperantistoj, havas tiajn amikojn.

* * *

Por publikigo en nia gazeto, ni ricevis en nia Redakcio, du gravajn komunikaĵojn; unu el la Redakcio de «Heroldo de Esperanto» kaj el la Direktantaro de la Aŭstria Esperanto-Delegitaro, la alian. — Ambaŭ komunikaĵoj rilatiĝantaj inter si, pritrktas aferon tro delikatan por ilia publikigo en gazetoj aŭ ĵurnaloj; aferon, laŭ nia opinio, pli malhelpantan la esperantistan movadon ol plibonigantan ĝin, ĉar tia publikigo kondukos al malordo anstataŭ al la konkordo kiu devas ĉiam regi niajn agojn. Tial do, por nia sankta afero, ni ne publikigos tiajn komunikaĵojn, konsilante al la interesuloj ke ili mem pritraktu harmonie kaj amike, sed tute ne publike, tian delikatan aferon.

ISTO



H A V E B L A

1/4 - paĝa anonco en nia gazeto
kostas nur 10 ptojn.; sed valoras
multe.

Angel Valdepeñas

Sastre - Tajloro

Pelayo, 6, pral.

BARCELONA

Vestits i abrics de tota mena a mi-
da per a home, des de 130 ptes.,
a 175 ptes. els de millor qualitat.

Bon tracte

Bon treball

ESPERANTO UZATA

Pelayo, 6, pral.

BARCELONA

Nota. Als esperantistes, 10 per cent de
descompte.

«Kataluna Esperantisto»

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO

OFICIALA ORGANO

DE LA

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono 6 svissaj frankoj aŭ 1'50 usonaj dolaroj

aŭ egalvaloro efektivebla en Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245. — BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anoncon, rajtos similan pri si,
por kio bonvolu sendi tekston publikigotan.